

# Tra la Mondo

## Tutmonda ilustrata Revuo esperantista

TRA LA MONDO · ESPERANTO · SEMAS · SIAJN · BONAJOJN ·  
PLI FACILIGAS · LA · KOMERCAJN · INTERRILATOJN · KONIGAS ·  
LA · INDAJN · ELTROVOJN · KUNHELPOS · POR · ANSTATAVI ·  
DE · FRUKTODONA · PACO · LA · SANGAJN · BATALADOJN ·  
KIUJ · DISSTRAS · HOMARON ·



*Allegorio speciale verkita de Sinjoro Pillel, fama gravuristo de medaloj, sendita en la francan Roman lernejon post ricevo de l' granda premio.*

Jara abono : 8 frankoj, ĉiulande. — Kvaronjara abono : 2.25 fr. — Unu kajero : 0 fr. 75 c.

# ĜENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

	Paĝo.
Nuntempaĵoj : La morteliĝintoj de Courrières, de <i>A. Montrosier</i> . . . . .	145 <sup>a</sup>
Diversaj Sciencoj : Bibliografio : Principoj de decimala klasigo, de <i>G. Chavel</i> , ( <b>Francujo</b> ) . . . . .	146 <sup>a</sup>
Samtempa Historio : Centjarfesto de reĝolando Bavarujo, de <i>Karl Zacherl</i> ( <b>Bavarujo</b> ) . . . . .	148 <sup>a</sup>
Teatro kaj Junula paĝo : Milito kaj Paco, de <i>Sam Meyer</i> ( <b>Francujo</b> ) . . . . .	149 <sup>a</sup>
Sportoj : La « Ĵiu-Ĵitsu » ( <b>Japona</b> bokso), de <i>M. Finot</i> . . . . .	150 <sup>a</sup>
Pri Esperanto : Esperanta movado. — Kroniko. — Bibliografio, <i>Steleto</i> kaj <i>Legadamiko</i> . . . . .	152 <sup>a</sup>
Komerco kaj Industrio : La Ekspozicio de Milano, de <i>J. Meazzini</i> ( <b>Italujo</b> ) . . . . .	154 <sup>a</sup>
Diversaĵoj : La Vivado de Teoplantisto en <b>Hindujo</b> , (sekvo) de <i>A. T. Simper</i> ( <b>Anglujo</b> ) . . . . .	155 <sup>a</sup>
Enŝipiĝo de Elmigrantoj en Le Havre, de <i>E. Legoffre</i> ( <b>Francujo</b> ) . . . . .	156 <sup>a</sup>
Artista kaj Literatura Vivado : Kocian, de <i>Svačina</i> ( <b>Bohemujo</b> ) . . . . .	158 <sup>a</sup>
Felietono : La Torento el Saŭmo, de <i>Daniel Lesueur</i> , esp. de <i>J. Flourens</i> ( <b>Francujo</b> ) . . . . .	159 <sup>a</sup>
Miksaĵoj : Por la propagando, ludoj, problemoj, k. t. p., de <i>Ch. Brunet</i> .	

## REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

Miksaĵoj, t. e.: ludoj, amuzajoj, problemoj kaj solvoj devas esti sendataj al S<sup>o</sup> Brunet, 9, Cours Victor Hugo, Bordeaux, (France).

Manuskriptoj, kaj mendoj KUN MONO al :

**Administranto de « Tra la Mondo », 15, Boulevard des Deux Gares, Meudon (S. et O), France.**

Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landoj ne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn, plenvalore.

Oni povas ankoraŭ ricevi « Tra la Mondo » de l'unua numero.

## Reabono — Grava avizo.

Oni bonvolu sendi la koston de l' abona renovigo, tiamaniere ke ĝi alvenu antaŭ la sendo de l' numero sekvonta la lastan pagitan, aŭ almenaŭ KAJ NEPRE skribi antaŭ la ĵus dirita templimo, por sciigi ke oni daŭrigas la abonon. Neplenumo de tiu kondiĉo okazigos la nericevon de la revuo.

## Ŝanĝoj de adresoj.

Oni bonvolu aldoni 0 fr. 50 poŝtmarke al ĉiu peto por ŝanĝo de adresoj.

### Direktado de INTERNACIA ILUSTRATA revuo.

Mi volas ĉi tie diri kelkajn vortojn, por klarigi al iuj aŭtoroj de manuskriptoj ricevitaj, kial ili ofte multe atendas la presadon de ili, kvankam ĉi tiuj ofte estas tre interesaj.

« Tra la Mondo » estas revuo *internacia kaj ilustrata*. Do, tiom kiom eble, mi penas por ke ĝia enhavo estu verkita de *diversnaciaj* aŭtoroj kaj, aliparte, ke ĉiam *ilustrataj* paĝoj estu sufiĉe multaj.

La plenumo de l' unua postulo igas pli interesa la revuon por la leganto, kiu, tiel, povas kompari stilojn de diversnaciaj verkistoj — ni nepre respektas la skribmanierojn se ili estas korektaj kaj kompreneblaj —; plue, tiu diverseco estas armilo inter la manoj de l' leganto kiu, per unu sola kajero de « Tra la Mondo », povas pruvi ke Esperanto estas divastigita en multaj landoj: ĉiu numero enhavas ĉiam almenaŭ artikolojn de 7 ĝis 8 diversaj nacioj.

La plenumo de la dua postulo estas kompreneble necesa por *ilustrata* revuo vere inda de tiu titolo.

Plezure ni vidis, per la leteroj ricevitaj, ke, sen esceptoj, la revuo plaĉas tia, kia ĝi estas, kaj ke oni plene aprobas la proporcion laŭ kiu ni enpresas ilustraĵojn kaj tekstojn: en *Esperanta* revuo, kiu estas antaŭ ĉio *legada* revuo, estas necese ke oni havu multe por legi kaj ke ilustraĵoj ne ensorbu la tutan spacon, kiel tio okazas en modernaj naciaj « ilustrataj ».

Alia malfacilaĵo por direktado de « Tra la Mondo » devenas de la plano kiun ni elektis, kaj kiu ofte devigas prokrasti en-

preson de interesa artikolo *literatura* ĉar alia, *sporta* aŭ *komerca*, postulas sian vicon.

Alifoje, kaj kvankam monata revuo ne povas pretendi je la nuneco, alvenas artikoloj, kiuj nepre ne povas atendi kaj tiaj artikoloj devigas, lasthore, eligi alian kaj kelkafoje, tute ŝanĝi iun numeron.

Resume: multoblaj zorgoj pri internacieco, variececo de l' temoj, sufiĉa nuneco, ilustrado, igas tre malfacila la preparadon de ĉiu numero de revuo tia, kia la via. Ho! la afero estus tute malsama se mi nur ĉerpis el la dokumentaskatolo la verkojn laŭ la alvena vico. Sed « Tra la mondo » ne plu havas sian karakterizan intereson por la legantoj; kaj la aŭtoroj, eĉ tiuj kiuj iafaje atendas sian vicon kaj kiuj eble estus pli frue presitaj, ne plu trovas la saman plezuron ol nun legi siajn verkojn en revuo ia, sen programo kaj sen plano.

Estas ankoraŭ multaj aliaj penadoj por redaktoro, ĉiam zorga pri intereso de la revuo, kiun li direktas, kaj kiu volas ke la revuo eliru ĉiumonate *tute akurate*; sed tio estas lia afero.

Mi nur volis sciigi al afablaj aŭtoroj ofte atendantaj multe sian vicon, ke la fakto devenas nur de la cirkonstancoj kaj neniel, ili bonvolu ĝin kredi, de alia kaŭzo.

Cetero skriboj atendus malpli longe se ni povus pliampleksigi la revuon, kion ni multe deziras: la interesatoj laboru al tiu celo varbante abonoin, kaj disvastigante nian agadkampojn. Sed... la faktoj montras ke, krom tute malfortaj esceptoj, ni tute devas nur konfidi al ni mem.

A. MONTROSIER.

## NIA VENONTA NUMERO.

Santiago Garcia Oltra: San-Jozefaj fajroj en **Hispanujo**. — Bonfaremeco, de Bino von Suttner (**Austrujo**), tradukita de Dr<sup>o</sup> Hanauer (**Germanujo**). — Leuto Lesnes: Mzab'o (**Alĝerio**). — P. Hedstrom: Ruinoj de Visby (**Svedujo**). — Booth: Melburna Pokalo (**Aŭstralio**) — Simper: en **Hindujo**. — J. Flourens: Felietono (**Italujo** kaj **Francujo**). — Dr<sup>o</sup> Gambier: La *rusa-japana* milito, je la medicina vidpunkto. — Virina paĝo. — k. t. p.... Ch. Brunet: Miksaĵoj.

# NUNTEM PAĴOJ

## La Morteliĝintoj de Courrières.

Pri kio ni povus paroli hodiaŭ, en ĉi tiu fako, kiu per la neantaŭvido, la miregigo, la tragedia flanko, egalas la reeniron en la lumon kaj la vivon, post dudek enmurigaj tagoj, de dekkvar ministoj de Courrières! Alĝesiras, la etatigoj, la disvastiĝo de la striko en la minregiono de Pas-de-Calais, ombriĝas antaŭ l' energio elmontrita de homaj estajoj por ne morti. Dudek tagojn, kvarcent kvardek horojn!

Kaj ĉi tiuj Pruvost kaj Nény, kiuj improvizis sin la estroj de tiuj malfeliĉuloj, kiuj ilin subtenis, rekuraĝigis, prezervadis de la morala senfortiĝo, kiaj homoj!

Malofte kruco de la honora legio estis surmetata sur pli indan bruston ol tiuj de Nény kaj Pruvost, l' humilaj laboristoj, la grandaj karakteroj.

A. Montrosier.



MINISTOJ LABORANTAJ.

### La drama rakonto de ministro Nény.

Jen estas la rakonto farita de Nény mem, en sia lito, al speciala sendito de nia granda franca kunfrato «Le Journal» kiu, de l'unua tago, estis ĉiam bonege sciĝata pri la katastrofo, kaj kies redaktoro, mina inĝeniero Laur, pretendis de l' unua tago ke, tre supozeble, ekzistis ministoj ankoraŭ vivantaj en la minejo.

«Kiam la eksplodo okazis, li diras, mi laboris sur la etaĝo 326 de la fosaĝo 3 kun kamaradoj. Sentaute la alvenon de l' nerespirebla aero ni forkuris. Ni volis supreniri per la puto, sed ni vidis ke ĝi estas ŝtopita per ruboj. Ni frapis sur la aerkanaletoj, oni respondis al ni; sed l' aero malsanigigis. Tiam ni remalsupreniris, ni marŝis en mallumo ĉar niaj lampoj estis estingigintaj.

«Oni senĉese marŝadis; kie oni estis, oni ne sciis. Tio longe daŭradis; oni ektuŝegigis je baroj, oni reiris. Irante, ni renkontis homojn, kiuj serĉis kiel ni, kaj oni estis ĉirkaŭe dudek kune. Tial ke mi ĉeestis kursojn en la lernejo de Alais, mi konas la minejojn; mi kondukis la aron; sed kvankam oni ĉiam marŝadis, nenian elirejon oni trovis.

«Supren, malsupren oni iris kaj reiris; ifoje oni aŭdis alvokojn, sed oni ne povis aliri la kriantojn. Fine ni atingis ĉevalojn kaj ni estas mangintaj avelon kaj fojnon, kaj, ĉar ni soifis kaj ne havis akvon, ni estas trinkintaj nian urinon. Mi restreĉis mian poŝhorloĝon ifoje kaj, iamomente, mi provis rigardi la horon. Kun la tempo mi sukcesis sufiĉe vidi, kaj kalkulis tiel la tempon. Ŝajnis al mi, kiam mi eliris, ke de dek ses tagoj ni estis interne. Mi estis erarinta je kvar tagoj».

### Kruelegaj suferadoj.

Nény daŭrigas

«Dum tagoj oni engratadis la teron per siaj ungoj por transiri rubaĵojn sub kiuj estis malvivuloj. Ifoje oni opiniis trafi la celon; kaj staris bariloj, kiuj malhelpis pasi kaj devigis malantaŭeniri. Tamen mi ne malesperis. Eĉ mi diris iun tagon al miaj kunuloj: «Kiam oni estos *récappé* savitaj, oni fotografiĝos sin kune». Se mi estus malesperinta, mi estus mortinta.

«Tamen oni estis malsata. Foje oni trovis senvivan ĉevalon; ĉiuj oni sin alĵetis kaj oni ĝin dispecigis. Ni da ĝi mangis kaj metis pecojn en niajn poŝojn. Ankaŭ oni enesploris la mortintajn kamaradojn kaj deprenis la panon enhavitan en iliaj sakoj, kaj oni ĝin mangis, kaj ankaŭ oni trovis akvon fluantan laŭ galerio, oni ĝin trinkis. Ĝi estis malpurigita per karbo, sed ĝi estis bona tiomalgraŭ.

«Fine, oni disigis dirante: «Kiuj eliĝos la unuaj, tiuj sendos helpon al la aliaj». Ni foriris, dekoje niaflanke. Tri el nia anaro mortis. Hieraŭ, post kelktaga disiĝo, ni retrovis ses kamaradojn el l' alia kunularo: la aliaj estis perdigintaj. Ni do restis dektri.

«Ni estis tre lacaj, ĉar ĝis nun oni estis malmulte dorminta. Ĉar regadis spirebla aero, oni pensis ripozi kaj oni dormis. Poste oni eniris «boueton» (t. e. galerieto fosita en la ŝtonego) kaj oni certigis, ke oni estas en la vejno Julie, apud la puto 2. Tiam, ĉar mi konis la lokon, mi diris: «La alkroĉiĝejo estas tie, tute proksime; ni kuru!» Ni kuris, kaj ni retrovis la kamaradojn, kiuj ege miris nin vidante. Ni estis «*récappés*».



REBONIGO DE MINGALERIA TRABARO.

FERNAND HAUSER

«Le Journal».

# Principoj de Decimala Klasigo

## kun apliko al Esperantismo.

De G. CHAVET (Francujo).

En unua artikolo, nia kunlaboranto tre klare elskribis la ĝeneralajn principojn de la decimala klasigo. Hodiaŭ li klarigas kiel tiuj principoj estas aplikeblaj al la esperantismaj dokumentoj.

### III. — Apliko al la Esperantismaj dokumentoj.

Nun, ni montru la aplikon de tiuj resumataj principoj al klasigo de la esperantistaj dokumentoj.

- 4 estas signo de Filologio.  
40 la diversaj demandoj de Filologio.  
408 la diversaj specoj de lingvoj.  
4089 la artefaritaj lingvoj.  
40892 la lingvo *Esperanto*.

Do, Esperanto, konsiderata kiel lingvo, scienco, aŭ afero, estas signata de la nombro 40892

Ni jam diris, ke por la lingvoj, oni uzas du klasigajn nombrojn: unu nombron por signi, ke verko koncernas la lingvon mem; kaj alian nombron por montri, ke ia verko estas verkita, en la lingvo.

Ekzemple: Verko, kiu koncernas la anglan lingvon estas signata: 42, sed verko pri Matematikoj, verkita en angla lingvo estos 51 '2' (1). Ni do havas du signojn 42 kaj '2', por la angla lingvo; kaj ni havas ankaŭ du signojn por la ceteraj lingvoj. Por Esperanto, laŭ propono de Generalo *Sebert*, oni uzas, kun la ĝenerala, fundamenta nombro 40892, la alian nombron '12', por montri ke ia verko estas verkita en Esperanto.

Nun, ni vidos kiel oni enmetas tiujn signojn, en la decimalajn klasigajn nombrojn.

En Esperantismo, oni havas tri specojn da dokumentoj aŭ verkoj klasigeblaj:

A - la verkojn en kiuj oni esploras la lingvon, laŭ la vidpunkto filologia;

B - la verkojn, en kiuj oni esploras la aferon mem, esperantismon (propagando, historio, revuoj, kongresoj...)

C - la verkojn ĉiuspecajn, literaturajn kaj sciencajn, verkita en Esperanto.

A. En la unuaj verkoj, por montri la subdividojn de la filologia scienco, aplikatajn al Esperanto, oni uzas konvenajn nombrojn, kun antaŭ ili, la signon -, por montri ke tiuj nombroj ne estas specialaj subdividoj de la nombro signanta Esperanton, sed ke ili povas esti ankaŭ almetitaj al nombroj signantaj la ceterajn lingvojn. Jen estas kelkaj el tiuj nombroj:

- 1 Ortografio.  
-11 Alfabeto.  
-15 Elparolo.

Verko pri la elparolo de Esperanto estos 40892-15

Se tiu verko estas verkita en franca lingvo 40892-15 '4'

Se tiu verko estas verkita en Esperanto 40893-15 '12'

Tiamaniere, oni klasigos la artikolojn de Zamenhof, pri la elparolo de nia lingvo

-3 signas la vortarojn.

Vortaro esperanta-franca estos 40892-3 ['12'-'4']

-5 estas gramatiko, sintakso. La Esperanta Sintakso de Fruictier, verkita en Esperanto, estos 40892-5 '12'; kaj la «*Commentaire*» de Sro de Beaufront estos 40892-5 '4'

La libroj por la instruado de la lingvo estas signataj de la signo -8; kaj la unuaj lecionoj, ekzercaroj estas -82. Do, la angla lernolibro de Geoghegan estos

40892-82 '2'

Ĉar ni memoras ke '2' signas ke la verko estas verkita en angla lingvo.

Ĉiujn tiujn verkojn, oni do povas ankaŭ subdividi, laŭ la lingvoj en kiuj ili estis verkataj.

B. Por doni decimalan klasigan signon, al la verkoj rilataj al Esperantismo, al la esperantisma afero, oni uzas la subdividojn, laŭ la ĝeneralaj formoj, pri kiuj ni supre parolis. Tiuj subdividoj, ni diris, estas montrataj de krampoj, inter kiuj estas nombro antaŭhavanta nulon.

Ĉar la signo (013) estas tiu de la verkoj pri defendo, utileco, laŭdado, propagando, de la afero, ĉiuj niaj propagandaj broŝuroj estos klasigataj

40892 (013)

kaj oni subdividos ilin, laŭ la lingvoj, almetante la signojn '2', '3', '4', '5'.....

se la broŝuro estas verkita en lingvoj angla, germana, franca, itala.....

La gazetoj kaj ĉiuj periodaj dokumentoj estas signataj (05). La Jarlibroj, adresaroj, estas signataj (058). Oni ilin subdividas, ĉu laŭ la loko, ĉu laŭ la dato. La Jarlibro tutmonda de De Menil, por 1904 estos

40892 (058) «1904»

Jarlibro de la bohemiaj esperantistoj, por 1902, estus

40892 (058) (437) «1902»

ĉar (437) estas la signo geografia de Bohemujo.

La Kongresojn oni montras per la signo (063). La verko: «*Le Premier Congrès Universel d'Espéranto: Séances, fêtes décisions*» eldonata en franca lingvo estos

40892 (063) '4'

kaj la Oficiala Protokolaro, eldonata en Esperanto

40892 (063) '12'

La signo de Historio estas (09). La artikolojn de niaj esperantistaj gazetoj pri historio de nia afero, oni signos

40892 (09)

kaj oni almetos la signon da la lingvo uzata en la artikolo kaj ankaŭ la signon de la epoko esplorata en tiu historio, kaj de la lando pri kiu oni parolas. Ekzemple: Historio de Esperantismo, dum la jaro 1890, en Anglujo, (verkita en franca lingvo) estos

40892 (09) (42) «1890» '4'

C. Por klasigi la verkojn literaturajn, artajn aŭ sciencajn, ĉu originale verkita en Esperanto, ĉu tradukita en tiu lingvo, oni uzas la decimalajn klasigajn nombrojn kiuj signas la ideojn enhavatajn en tiuj verkoj. Do oni nur bezonas uzi la ĝeneralajn klasigajn tabelojn. Tamen du rimarkoj estas necesaj:

Unua rimarko.

Kiam oni havas verkon pri Matematikoj en germana lingvo, oni ĝin signas

51 '3'

Similan verkon en Esperanto estos do signata

51 '12'

Tiu nombro klasiga estos tre sufiĉa, kiam la verko matematika en Esperanto estos lokita meze de aliaj verkoj matematikaj en aliaj lingvoj. Sed, se tiu verko matematika apartenas al biblioteko de verkoj esperantistaj, ĉiuspecaj, estos bone ke oni ĝin konsideru nur kiel verko de Esperantismo aplikata al Matematikoj. En tiu okazo, oni ĝin signos

40892: 51 '12'

Tiel, la Historio resuma de l' Arbitracio konstanta, de Sro Moch, estos signata en biblioteko pacifista

341.63 (09) '12'

(1) Por montri la lingvon uzatan en verko, oni povas uzi ankaŭ la signon =. Ekzemple

$$51 = 2$$

Sed la signo ' ', tute enkadrigante la nombron, estas preferinda.



sed, en la bibliotekoj esperantistaj, oni ĝin konsideros precipe kiel verko *esperanta* kiu rilatas al arbitracio kaj oni ĝin signos

40892: 34163 (09) '12'

**Dua Rimarko.**

Oni scias jam, ke la cifero 4 signas Filologion, kaj ke

42	signas la lingvon anglan
43	germanan
44	francan
45	italan

Ĉar la cifero 8 signas la literaturon, la subdividoj de tiu klaso estas samaj kiel tiuj de Filologio, kaj same signataj; oni do havas

82	literaturo angla
83	germana
84	franca
85	itala .....

Aliflanke, oni scias ke la signo '12' montras ke verko estas verkita en Esperanto. Sekve, mi propon as, ke por la literaturo originala Esperanta, kiel « Trafendita Turo » de Cart, « Perdita kaj Retrovita » de Boirac, oni uzu la nombron 812 por montri ke la verko apartenas al la sola Esperanta literaturo. Do, ĉar « Trafendita Turo » estas poezia balado, kaj ĉar tiaj verkoj estas signataj de la signo -14, tiu verko estos

40892: 812-14

kaj, ĉar la rakontoj kaj legendoj estas signataj -34, la verko de S<sup>ro</sup> Boirac estos

40892: 812-34

Tiu metodo estas kompreneble aplikota, nur al la originalaj verkoj, nur literaturaj; por la verkoj sciencaj kaj aliaj, ankaŭ originale verkita esperante, oni uzos la decimalan nombron kiu signas la sciencan parton, kun, antaŭe, la ĝenerala nombro 40892 kaj, poste, la signo '12'

Ni ne povas doni tie ĉi la klasigajn nombrojn de ĉiuj verkoj klasigitaj, de la Esperantista literaturo. Oni ilin trovos en la tabeloj. Ni nur donos ekzemplon de signado de la tradukoj, ĉar oni havas multe da tradukoj, en la esperanta verkaro. Por tiuj verkoj, oni uzas la nomon de la verkinto kaj la unuan literon de la titolo de la verko. Jen la signo decimala de « Hamleto » de Shakespeare, tradukita de Zamenhof

40892: 82-23 (Shakespeare 7. H. 03 '12')

Jen estas la klarigo:

40892	Esperanto
82	Angla literaturo
23	Dramo
7	Verko aparta de la aŭtoro
H	Unua litero de « Hamleto »
03	Traduko
'12'	en Esperanto

**Eliza Orzeszko: LA INTERROMPITA KANTO, tradukita de Kabe.**

« Ĝi estis unu el tiuj dometoj, kiuj ŝajnas rideto de l' kamparo, aŭ ĝia eĥo, falinta inter la urbajn stratojn kaj domojn. Malgranda, blanka, kun balkoneto sur du kolonoj, ĝi staris en nezorgata ĝardeno, kiu ĝuste pro la nezorgado ŝajnis verda kaj freŝa densejo. Ĝi tute ne posedis korton; de l' strato apartigis ĝin parto de l' ĝardeno kaj tabula ĉirkaŭbaro tiel alta, ke oni povis vidi nek de l' strato la dometon, nek de l' fenestroj de l' dometo la straton. De malproksime — angulo kvieta kaj bela; de proksime — preskaŭ ruino, kies muroj kurbaj de maljuneco, nezorge blankigitaj per kalko, duone kaŝiĝis en la verdaĵo de rampanta supren fazeolo. Ekster la fazeolo iom da floroj kreskis antaŭ la balkoneto, sur kiu staris du mallarĝaj kaj malnovaj benkoj. »

En tiu ĉi kadro; en la « malgrandaj kaj malaltaj ĉambroj de l' dometo, kun plankoj maldelikataj, kamentoj malgraciaj el verdaj kaheloj »; en la belega kaj vasta parko de princo Oskaro fine, okazos la drameto, komencanta kaj daŭranta kiel idilio ĝis la momento kiam vualo disŝiriĝas kaj la vero aperas. Ho! ve, la princoj ne plu edziĝas kun paŝtistinoj, kaj ridego, maldoĉe sonoranta, ĝin montras al la gelegantoj.

Sed antaŭ tiu kruela fino, kiom da ĉarmaj liniaroj, kiom da delikataj pentraĵoj, en kiuj Ŝi kaj Li okupas la ĉefan lokon.

Ŝi, Klara Wygrycz, « ne estis perfekte bela, sed ŝi posedis la freŝecon de deknaŭ jaroj kaj la ĉarmon de siaj vivaj movoj, rigardoj kaj ridetoj. » Ŝi havis ankaŭ la belecon de pura animo, kiu sin mem ne konas, kaj kiu konsideras la bonon kiel tute natura; la senton de l' justo kaj de l' pravo.

Li, estis « viro alta kaj tre gracia, eleganta. La ovalo de lia vizaĝo estis delikata kaj pala, la vangoj glate razitaj; la mal-

Per tiu decimala signo, oni povas fari subdividojn laŭ la nomoj de la aŭtoroj, kaj sub-subdividojn laŭ la titoloj de la verkoj klasigitaj alfabete.

**IV. — Ordigo de la klasigaj nombroj kaj finaj rimarkoj.**

La sistemo, kiun ni tuj esploris, ŝajnas certe iom komplika; sed ĝia komplikeco, estas nur ŝajna. Oni devas diri, ke ĝi estas, kiel eble malplej komplika, kaj ke post iom da atento, kaj da ekzercado, oni fine opinias ke ĝi estas tre simpla. Tre certe, ĝi ne estas tute logika, tute racia, sed ĝi estas kaj volas esti nur praktika, oni povas diri, ke ĝi estas *mirinde* praktika. Dank' al tiu sistemo, kiam oni konas la ĝustan nombron bibliografian, kiu signas ian ajn verkon, oni nur bezonas serĉi, al la rango okupata, laŭ la nombra serio, por trovi la respondantan karton, inter milionoj da aliaj kartoj; kaj tiun serĉadon, oni faras facile, senerare, senŝanceliĝe, en kelkaj sekundoj.

Sed por ke tiu serĉado tiel rapide sukcesu, estas necese, ke la nombroj estu bone ordigitaj. Ni jam supre parolis, pri la ordigo de tiuj nombroj. Sed niaj supraj klarigoj estas aplikeblaj nur al nombroj simplaj, kiel 54, 895, 40892... Ĉar la klasigaj nombroj estas preskaŭ ĉiam malsimpligitaj, de tipografiaj signoj, oni devis elekti ordigan metodon por tiuj signoj.

Oni unue ordigas la simplajn nombrojn:

40892

poste, la krampojn: 40892 (013)

poste la signon « » 40892 (09) « 1905 »

poste la signon ' ' 40892 (058) ' 4 ' 4

poste la signon : 40892: 84

poste la signon - 40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

40892-82

GABRIEL CHAVET,  
Sekretario de « Esp. Centra Oficejo ».

A. MONTROSIER.

# Centjarfesto de regolando Bavarujo.

Verkita de KARL ZACHERL (Bavarujo).

Je la 1<sup>a</sup> de Januaro 1906 cent jaroj malaperis en la vasta maro de l' eterneco, de kiam Bavarujo, per la dankemo de Napoleono I<sup>a</sup> fariĝis regolando. Senmezura estis, kompreneble, la ĝojeĝo de la bavara popolo; ĉiuj patriotoj ja esperis, ke tiu fariĝo ĝojiga estas komencaanta novan tempon plenan je gloro kaj brilado, plenan je feliĉo kaj bono. Kaj tiu ĉi espero de l' bavara popolo efektive tre kontentige plenumiĝis.

De cent jaroj nun regas la reĝa familio Zweibrücken - Birkenfeld en Bavarujo, kaj prave ni povas nin glori, tial ke ni posedas regantan familion tiel bontaŭgan, kiel malmultaj landoj de Eŭropo. Kaj vere, oni pri tio konvinkiĝos tuj, se oni nur iomete pririgardas la agemon fruktoplenan de la ĝisnunaj kvin reĝaj regnestroj.

Per prudentaj diplomatiaj kaj politikaj, la unua reĝo, Maksimiliano Josefo I<sup>a</sup> (1806-1825), sukcesis formi belan ŝtatkonstruaĵon el la ruiniĝintaj ŝtatoj de la antikva imperio germana. Li feliĉiĝis ankaŭ, multe pli true ol la ceteraj germanaj teritoriaj, sian fidelesindonatan popolon per liberala konstitucio (26<sup>an</sup> de Majo 1818). Lia sekvinto, reĝo Ludoviko I<sup>a</sup> (1825-1848), per sia ampleksa kaj fruktoplena artkulturo, sciis fari el Bavarujo gravan kampon de la artoj plastikaj; kaj la ĉefurbo Munĥeno fariĝis la difinita loko



LA REGNESTROJ DE BAVARUJO DE LA JARO 1806<sup>a</sup>.



REĜO MAKSIMILIANO JOSEFO I<sup>a</sup>.



PRINC-REGANTO LUITPOLDO.

*La iama luksego kaj la nuna burĝa simpleco.*

por la plej belegaj muzeoj, kaj la pilgrimcelo de la artamantaro. Celante la feliĉigon de sia amata popolo, la tria reĝo, Maksimiliano II<sup>a</sup> (1848-1864), pliperfektigis la konstitucion kaj plialtigis la popolon per la sciencoj kaj libera kleroj. La kvara reganto, la mondfama Ludoviko II<sup>a</sup> (1864-1886), estis

eminenta zorganto de artoj ĉiuspecaj. La nomo de lia favoritulo, Richard Wagner, kaj belegaj artkreaĵoj, ekzemple la ĉie konataj kasteloj de Herrenchiemsee (imitaĵo de la kastelo de Versailles), Linderhof kaj Neuschwanstein, pravas kaj pravigas mian diron. Malfeliĉe al tiu ĉi

reĝo, kiu ade estos neforgesebla ĉe la popolo bavara kaj daŭre vivados en la koro de ĉiu patrioto, la sorto donis finon tre tragedian. Kaj ĉar ankaŭ lia frato, Otto I<sup>a</sup>, estas malsana, prenis sur sin la regadon lia onklo, Luitpoldo, kun kiu nova epoko de ĉiurilata prosperado komenciĝis por Bavarujo.

Kaj nuntempe mia glorprena patrujo bavara estas, dank' al la saĝeco kaj al la patriotisma intencaro

desiaj regantoj, respektata kaj honorata kiel la dua ŝtato de la nun unuigita potenco imperio germana, kaj ĉie nia blankblua flago povas flugeti kunrajta fiereco. Kaj ankaŭ ekstere, same kiel interne, Bavarujo ĝuas la plej altan feliĉon: Popolo kaj reĝo kunigas en neŝanĝebla fideleco reciproke.

Originale verkita de KARL ZACHERL el Passau (Bavarujo).

# Milito kaj Paco.

Originalo de SAM. MEYER (Francujo).

La sekvanta tre amaza teatraĵeto, de unu el niaj plej konataj kaj lertaj esperantistaj aŭtoroj, estos tre utile ludata en festoj esperantistaj kaj en salonoj. Plezure ni liveras ĝin al niaj gelegantoj.

(Sur la scenejo, du tabloj kaj du seĝoj; sur ĉiu tablo, karafo, glaso kaj sukerujo. Dekstre aŭŝo kun la vortoj: Hodiaŭ, je la 9<sup>a</sup> vespere, parolado de S-ro Paŭlo pri La Paco. Maldekstre alia aŭŝo: Hodiaŭ, je la 9<sup>a</sup> vespere, parolado de S-ro Marko pri La Milito).

*Samtempe eniras Paŭlo dekstre, Marko maldekstre. Ili rigardas sin kun ekmiro, demetas la ĉapelon, iras ĉiu al sia tablo, atendas momenton kaj samtempe ekparolas: Sinjoro... Ili rigardas sin kolere.*

PAŬLO. Sed, sinjoro...

MARKO. Pardonu, Sinjoro...

P. Sajnas, ke vi ne scias, ke por hodiaŭ vespere estas anoncita parolado...

M. ... farota de mi.

P. De mi farota!

M. Kiel?

P. Certe!

M. Vi ŝercas!

P. Vidu mem. (*montrante la aŭŝon*) «Hodiaŭ, je la 9<sup>a</sup> vespere, parolado de S-ro Paŭlo, ĝi estas mi, pri La Paco»

M. Sed tie ĉi: (*montrante la alian aŭŝon*) «Hodiaŭ, je la 9<sup>a</sup> vespere, parolado de S-ro Marko, ĝi estas mi, pri la Milito.»

P. Tio estas bedaŭrinda eraro.

M. Eraro viaŝlanke.

P. Ĉiokaze, mi estas invitita paroladi, kaj mi parolados.

M. Ankaŭ mi, certe: tamen, ĉar nenio urĝas: komencu vi, mi parolos poste.

P. Ne, vi komencu.

M. Neniel.

P. Komencu, mi petas.

M. Tion mi ne faros.

P. Ne incitu min, sinjoro. Mi estas pacieca; tamen, se oni min kolerigas...

M. Mi kontraŭe estas batalema, sed nenia okazo estas por koleri. Permesu, ke mi faru proponon.

P. (*Reŝignacie*). Faru

M. Vi deziras paroladi?

P. (*Indigne*). Ĉu mi deziras!

M. Nu ankaŭ mi volas paroli. Kaj vi ne volas komenci?

P. (*Furioze*). Ne!

M. Bonege. Do, ĉar ambaŭ ni deziras paroli kaj neniu volas esti la unua, mi vidas nur unu rimedon.

P. Kian?

M. Ni samtempe parolu.

P. Jen estas ideo!

M. Ĉu oni provos.

P. Ni provu.

M. Konsentite. Ni komencu. (*Al la publiko*) Sinjoroj...

P. kaj sinjorinoj,

M. Hodiaŭ...

P. vespere...

M. mi havas la honoron...

P. diri al vi per malmultaj vortoj...

M. kion ni pensas pri la temo...

P. anoncita per la aŭŝo.

M. pri la milito.

P. pri la paco.

M. Ĝi estas ja temo tute grava,

P. kaj pri kiu vi certe konsentos kun ni:

M. senutile estas memoriĝi vin pri la gravaj faktoj de la antikva kaj de la nuntempa historio.

P. Vi scias ja, ke la plej grava malhelpaĵo en la antaŭenirado de la civilizacio estas...

M. la paco.

P. la milito! tiu kruela, nehumana, malĝojegiga milito,

M. la moliga, endormiga, sennerviga paco, per kies kulpo niaj junuloj fariĝas timemaj kaj senkuraĝaj, kiel leporoj!

P. Pripensu la multajn progresojn atingotajn de la homaro,

kiam ni ne eluzos plu niajn fortojn kaj nian monon por elspezi-gaj kaj ruinigaj armadoj!

M. Memoru pri la heroaĵoj de la grandfamaj militistoj de ĉiuj epokoj. Nur ilia ekzemplo povos savi la homaron.

P. Nur dum la paco estas eblaj la progresado de artoj, sciencoj kaj la belaj eltrovoj, kiuj plifaciligas kaj plibeligas la homan vivon.

M. La sola milito donas la eblon plilarĝigi la komercon de la nacio, kaj havigi al ĝi novajn kaj profitajn vendejojn.

P. Inter la plej belaj eltrovoj, frukto de la pacado, estas la eipenso de lingvo internacia.

M. Ha! jes, lingvo internacia, Esperanto! Jen estas vere glora eltrovo.

P. Kaj Esperanto siavice estas tre efika pacigilo, permesanta al ĉiuj popoloj sin interkompreni kaj sin renkonti frate kaj amike.

M. Esperanto estas admirinda helpilo por militistoj, ĉu kiel komprenigilo por interligitaj armeoj, ĉu por ricevi utilajn informojn, kiam oni militas en fremda lando.

P. La plimulto el la Esperantistoj estas certe amikoj de paco.

M. Militistoj estas preskaŭ ĉie la helpantoj kaj propagandistoj de Esperanto.

P. Nia kara majstro mem, la glora D<sup>ro</sup> Zamenhof, estas granda pacemulo. Ankaŭ pacamanto estas...

M. Ĉu mi citos la nomojn de Generalo Sebert, prezidanto de la organiza komitato, Kolonelo Pollen, prezidanto de la Brita esperantista Asocio, Ingla Ors, aŭtoro de la hispanaj lernolibroj? La kreinto de la bela Esperanta movado en Nordafriko estas militisto, Kapitano Capé.

P. Pacamanto ankaŭ estas S-ro Montrosier, la redaktoro de »Tra la Mondo«

M. En la speciala militista lernejo Saint-Cyr, oni instruas pri Esperanto. Cetero ni ne forgesu, ke unu el la unuaj pioniroj de Esperanto en Francujo estis artileria kapitano.

P. Unu el la plej interesaj revuoj Esperantaj estas ja nomata «Pacifisto»;

M. Vi scias la nomon de tiu distinginda oficiro...

P. Ĝin direktas tre lerte S-ro Gaston Moch.

M. (*Samtempe*). Gaston Moch. (*Dum la publiko aplaŭdas, ili per sama gesto prenas la glason, trinkas, salutas la publikon.*)

P. Li estas mia amiko.

M. kaj la mia.

P. En tio ĉi do ni konsentas,

M. kaj por saluti la gloran nomon de Zamenhof!

P. Vivu Zamenhof!

M. Sinjorinoj...

P. kaj sinjoroj,

M. ŝajnas al mi, ke estus ja tute senutile...

P. daŭrigi la paroladon...

M. kaj eluzi vian paciencon...

P. por elmontri aferon tute certan,

M. pri kiu ĉiu el vi havas opinion jam faritan.

P. Mi scias,

M. ke vi scias,

P. ke tre dezirinde estas nun...

M. la milito,

P. la paco.

M. Mi dankas vin pro via afabla aŭskultado,

P. kaj pro viaj kuraĝigaj aplaŭdoj,

M. mi proponas, ke antaŭ ol disiri,

P. vi elmontru vian neduban konvinkon...

M. vi krii kunc kun mi...

P. Vivu la paco!

M. Vivu la milito!

(*Ili salutas la publikon, salutas sin reciproke, denove la publikon, remetas la ĉapelon, kaj ĵere eliras unu dekstren, alia maldekstren.*)

SAM. MEYER.

# La « Jiu-Jitsu » (Japona Bokso).

Verkita de M. FINOT (Francujo).



KIEL ONI ROMPAS MANRADIKON.

Nur de 60 jaroj oni konas la metodojn de tiu sporto, kiuj antaŭe estis sekretaj, kaj oni ilin ĉie instruas; tamen kelkaj el ili estas ankoraŭ misteraj; la profesoroj transinstruas ilin nur al siaj plej bonaj lernantoj, kaj neniel alie diskonigas.

Kiam li volas batali, la ĵiuĵitsuisto placas la manojn antaŭen, kaj disigas la fingrojn, laŭ maniero de la kato, kiu volas salti kaj ungoskrapri: ĵiu-ĵitsu estas kata sporto. Li antaŭeniras flekseble, fikse rigardas sian kontraŭbatalanton kiel kaptotajon. Subite tiu estas ekkaptita, lia brako returnen, kaj post unu sekundo li falas teren.

Nur ĵetinte teren malamikon, li povas doni al li dolorajn batojn, per kiuj li venkas lian forton. Ĝi estas unu el la plej elegantaj — kaj eĉ la plej teruraj — manieroj por lin faligi: li ekkaptas lin per manikoj kaj almetas piedon sur lian stomakon; li mem falas malantaŭen sur dorso kaj fortiras kun si sian kontraŭbatalanton, kiu perforte falas, ĉu sur vizaĝo, ĉu sur kranio, ĉu sur nuko, laŭ la rapideco per kiu oni plenumas la movon, kaj laŭ la momento, kiam oni ellasis la manikojn. Kiam la malamiko estas teren, la ĵiuĵitsuisto rapide premas lian kolon inter siaj femuroj, kaj ekkaptas unu el liaj brakoj, kiun li returnenirigas kaj rompas.

Kelkaj el tiuj manieroj estas tiel doloraj, ke la batalanto ofte svenas post kelkaj sekundoj kaj nenion povas fari por barakti: refaldo de la supera lipo al la nazo, apogo de dika fingro sur lipo, aŭ de genuo sur kokso.

Kiam li staras, la ĵiuĵitsuisto havas ankaŭ terurajn manierojn. Ekzemple li kaptas sian kontraŭulon per maldekstra brako kaj turnigas lin sur sia dekstra kruro, por rompi kune fingron kaj kubuton, kaj elartikigi ŝultron. Sed estas necese ke tio estu tre rapide farita, kaj ke ĉio estu rompita antaŭ ol li havu tempon por barakti kaj liberiĝi.

Laŭ fama profesoro Ré-Nié (Régnier france, japonigita), la plej grandega forto ne povas venki la ĵiuĵitsuiston. Ĝi pli homo estas forta, des pli li baraktas, kaj des pli la kontraŭbatalo estas dolora, ĉar per lia forto mem la kontraŭulo premas lin ĉirkau siaj kruroj. Tamen la profesoroj de bokso ne tiel opinias, kaj ili certigas ke ĵiu-ĵitsu estas multe pli malbona ol la malĵuna bokso. Efektive ili diras, por ĵiuĵitsu estas necese ke oni estu apud la malamiko kaj ke oni korbatalu, kaj por kian ajn baton doni, por returnenirigi brakon, estas necese ke oni estu la plej forta. Ĉu oni kredas ke malgranda kaj maldika homo povos venki profesion boksiiston? Kiel, per malgranda mano, oni povos premi brakon de fortika homo? Kontraŭe, en bokso, la pugno malgranda batalas tiel profite, kiel dikega pugno: la unua eniĝas en



SENMOVIGO KAJ SUFOKIGO.





SUFOKIGO PER ANTAŬBRAKO, KAJ ELARTIKIGO DE MANBRADIKO.

haŭton kiel borileto; la dua falas kiel martelo.

Jen estas do la dŭ opinioj: la Jiujitsu estos precipe perforta kaj rapida maniero por defendo, kiun oni uzos en neprokrastebla danĝero; la bokso estas sporto de lerteco kaj forteco, kiun oni ĉiam lernos; sed oni povos, laŭ okazo, uzi la du metodojn: oni tiel estos certa pli facile barakti kaj venki.

MARCEL FINOT,  
el Longwy (Francujo)



KIEL ONI EVITAS TRANĈILBATON.

### Al la Polusoj.

La aerostatoj kaj la aŭtomobiloj, kies uzo je scienca vidpunkto estis ĝis nun iom malgranda, estos baldaŭ uzitaj por la vojaĝoj al la polusaj regionoj.

La bedaŭrinda rezultato de la vojaĝo de Andrée ne malhelpis ke oni pripensu nune pri novaj esploradoj aerostataj: S<sup>ro</sup> Wellmer, amerika gazetisto, kiu jam en 1896<sup>a</sup> loĝis dum

dŭ someroj 80<sup>an</sup> gradon de larĝo, kaj en 1899<sup>a</sup> atingis 82<sup>an</sup>, interlatisigis kun S<sup>ro</sup> Santos Dumont kaj intencas konstrui direkteblan aerostaton, kies movforto estos plenumita de 25 H. P., kaj esperas foriri el Spitzberg al la Norda Poluso; la tuta vojaĝo daŭros proksimume kvin tagojn kaj la esplorado komencos la proksiman jaron.

Aliaflanke S<sup>ro</sup> Charcot, kiu jam de du jaroj faris polusajn esploradojn, vol-

as partopreni kun S<sup>ro</sup> Grafo de la Vaulx, kies famajn aerostatajn vojaĝojn oni konas, kaj intencas aliri al la Suda Poluso per uzo de tri manieroj de veturilo: ŝipo, aerostato, aŭtomobila glitveturilo. Estos necese ke oni laboru 18 monatojn, por ke esplorado estu preta kun la plej grandaj ŝanĉoj de sukceso.

Bonan ŝanĉon al tiuj kuraĝegaj vojaĝantoj!

M. F.

### Franca Turing-Klubo.

La internacia Olimpa Komitato decidis aljuĝi por 1906 la unuan *Olimpan Pokalon*, okaze de l' 100,000<sup>a</sup> membro baldaŭ akceptita de tiu asocio, kaj pro la grandegaj servoj faritaj de ĝi al la Sportaĵoj.

Tiu valora elekto estas tiom pli ŝatinda, ke la komitato enhavas 31 anojn de 21 nacioj diversaj de l' malnova kaj nova mondo, inter kiuj 4 nur estas francaj.

Ni ĝoje gratulas la « Franca Turing-Klubo », kiel turisto kaj kiel Esperantisto.

Ni memoru ke la aliĝo al la Turing-Klubo, kiu kostas nur 5 frankojn, donas grandajn profitojn dum la vojaĝoj, kaj estos tre utila, aparte por la esperantistaj kongresanoj.



KIEL ONI EVITAS LA PIEDBATON.

## Turismo

### Per la Turistoj.

*Poŝtlibro Internacia por Aferistoj, Turistoj, k. c.* de George Norman, estas tre praktika libro. En la unua parto estas ĉiama kalendaro gregoria kaj julia, uzebla por ĉiuj jaroj el la kristnaska epoko; en la dua troviĝas eŭropaj kaj nordamerikaj internaciaj egalecotabeloj pri moneroj, pezoj kaj mezuroj kaj kutimaj komercaj prezoj.

La verko rekomendinda pro ĝia enhavo estas tre zorge kaj klare prezentita. Utila por aferistoj, turistoj, scienculoj, ĝi estas ankaŭ bonega propagandilo. (Hachette & Cie).

# PRI ESPERANTO

## Kroniko.

La Antverpena grupo. — Esperanto en Polujo. — Svedaj kaj finaj batalantoj. — En Bohemujo. — Ĉiama ekspozicio en Vilno. — Komercistoj kaj Esperanto.

En Antverpeno, la propagando komencis per parolado de Komandanto Charles Lemaire, de la belga artilerio. La unua kurso malfermiĝis en Oktobro 1902<sup>a</sup>, en la reĝa Ateneo. La profesoro estis Sinjoro *Lucien Blanjean*, kaj ĉirkaŭ 15 lernantoj sekvis tiun kurson, kiu okazis ĉiudimanche, je la 9<sup>a</sup> horo de l' mateno.

En decembro de l' sama jaro 1902<sup>a</sup>, kelkaj Esperantistoj kunigis kaj decidis komenci propagandon kaj organizi publikan kurson. La malferma parolado okazis en la Hôtel Stanley, la 10<sup>an</sup> de januaro 1903<sup>a</sup>, kaj la kursoj komencis la 17<sup>an</sup>, en la Taverne Royale. En februaro sekvanta, la lernantoj aprobis la fondon de Grupo, kiu permesus aĉeti librojn por biblioteko, diversajn esperantistajn ĵurnalojn, kaj daŭrigi la propagandon. La Grupo, fondita de 30 membroj, ricevis la nomon: « Antverpena Grupo Esperantista ».

De tiu tago, la Grupo prosperis subtenita de la Antverpenaj ĵurnaloj « La Métropole », « Le Matin » kaj « Handelsblad » kaj ĝi kalkulas hodiaŭ ĉirkaŭ 120 membrojn. Ĝia agado ne ĉesis, ĉar li organizis 1903<sup>e</sup>, ekspozicion en la Geografia ekspozicio; 2<sup>an</sup> ekspozicion en 1904<sup>aj</sup>, en la Ekspozicio de fotografajoj; 3<sup>an</sup> ekspozicion en la publika salono de la Métropole, en 1905<sup>aj</sup>. Ĝi partoprenis ankaŭ en ekspozicioj en St. Omer (Francujo), St. Louis (Unuigitaj ŝtatoj amerikaj) kaj Alger. Ĝi organizis kursojn por viroj, por virinoj, por flandraj kaj kurson superan. Ĝia biblioteko enhavas ĉirkaŭ 200 esperantistajn librojn.

De kelkaj semajnoj, Antverpena Grupo Esperantista aliĝis al la Belga Ligo Esperantista, fondita en Aŭgusto lasta.

Ĝia komitato estas la sekvanta: Prezidanto, S<sup>o</sup> R. Van Melckebeke, Doktoro de sciencoj. Vicprezidanto, S<sup>o</sup> O. Van Schoor, Farmaciisto. Sekretario raportanto, S<sup>o</sup> F. Dupont, subleŭtenanto en la 8<sup>a</sup> linia regimento. Kasisto, S<sup>o</sup> E. Van den Kerckhove, komisiisto ekspedisto por maraj transportoj. Membroj: S<sup>oj</sup> J. Coox, A. Van der Biest A. Cassiers, E. Leclercq kaj A. Van Pelt.

L. JAMIN.

Same kiel « Daily News », « Le XX<sup>e</sup> Siècle », ĉiutaga belga ĵurnalo, entenas nun regule, ĉiudimanche, artikolon en Esperanto. Tio estas nova kaj valora akiro por nia afero. Oni sendu artikolojn (25 liniojn maksimume) al S<sup>o</sup> L. Blanjean, 83, rue du Collège, Ixelles. Tre plezure, laŭ peto de « Belga Sonorilo », ni represas tiujn sciigon kaj alvokon.

De l' jara raporto de « Varsovia Societo esperantista » de l' sekretario, ni eliras la jenon: la « Varsovia Societo Esperantista » estis fondita la 6<sup>an</sup> de Decembro 1904 de 12 personoj, al kiuj aliĝis poste 7, ne estintaj ĉe la unua kunveno. Ili elektis provizore D<sup>ron</sup> L. Zamenhof prezidanto kaj S<sup>on</sup> A. Grabowski kiel vicprezidanto kaj sekretario, kaj komencis regulajn kunvenojn kaj laborojn. Ĉar fonda de novaj societoj estas afero tute nefacila en Polujo (1), oni decidis krei en komenco filion de la societo « Espero » en Peterburgo, kiu havas rajton posedi filiojn en diversaj urboj de rusa imperio kaj same ankaŭ en Polujo, kaj komencis zorgoj pri tio. Bon-

vola konsento de la komitato de « Espero » alvenis baldaŭ sed aprobo de registaro estis donata nur la 28<sup>an</sup> de Februaro 1905. Tiam en unua jam oficiala kunveno, kiu povis esti konvokita nur la 8<sup>an</sup> de Majo, oni elektis plenan komitaton aŭ regularon. Ĉar nia Majstro pro multaj siaj laboroj ne volis absolute akcepti prezidantecon la kunveno elektis lin prezidanto honora kaj S<sup>oj</sup> Antoni Grabowski-prezidanto efektiva, Kazimierz Bein-sekretario, Leopold Blumenthal-viceprezidanto, Adam Zakrzewski-kasisto, Aleksander Brzostowski-bibliotekisto. La agado de la societo dum tiu ĉi jaro devis esti ofte interrompata pro politikaj okazoj, kiuj jam de du jaroj daŭras en nia lando. Tamen la societo krom siaj kunvenoj, en kiuj estis preparolataj aferoj ĝeneralaj de Esperantismo, organizis kursojn kaj publikajn paroladojn, en kiuj partoprenis S<sup>oj</sup> Grabowski, Blumenthal, Zakrzewski. »

La agado de l' grupo ne limiĝis al tiuj kursoj kaj paroladoj. La raporto donas nomaron de verkoj presigitaj de S<sup>o</sup> D<sup>ro</sup> Kazimierz Bein, Antoni Grabowski, Leo Belmont, Aleksander Boleslaw Brzostowski, Adam Zakrzewski, kiuj ĉu per libroj, ĉu per ĵurnalaj artikoloj, partoprenis inde kaj venke en la disvastigo de Esperanto.

Pruvo de sukceso: la grupo enhavis, je la fino de 1905, 66 membrojn kaj enkasajo de 332 fr. Ĝi monofervis, po 100 fr. por la Boulonja kaj Geneva kongresoj.

« Esperantisten », en sia 2<sup>a</sup> N<sup>o</sup>, vere bonega, enhavas la plej bonajn sciigojn pri « Esperanto en Nordo ». Fervore klopodas niaj Svedaj kaj Finnaj samideanoj:

En Svedujo, S<sup>oj</sup> G. H. Backman (*Helsingborg*: nova klubo); E. G. Risberg, popola instruisto (*Ref-sund*); I. A. Johansson (*Stelleryd*); Rudolf Mansson (*Karlskamm*, malnova klubo); Edvin von Scheele (*Ronneby*): nova klubo — A. von Tell, prez.; fino E. Petersson, v. pr.; E. von Scheele, sek.; fino Tora Petersson, kasisto); A. S. Immel de la Nietzsche (*Oskarström*: nova klubo ĉe internacia laboristaro en la « jutefabrikker » — G. E. Blomqvist, prez.; I. de la Nietzsche, sek.; J. G. Johansson, kas.; J. Rheinhold Karlsson, Birger L. Palmquist).

En la « *Marianel und praktiska skola* » estas nun instruata Esperanto-dank'al la klopodoj de nia konata nia Sveda propagandistino Hilda Cederblad, kaj la bonvolo de l' direktoro, rektoro A. Lingström; baldaŭ estos same en « *Västerås handelsinstitut* » (dir. S<sup>o</sup> Erik Kulm), kaj espereble en « *Kristine hamns praktiska skola* ».

La komercaj gazetoj « *Affärsvärlden* », « *Korrespondens* » kaj « *Stockholms handelstidning* » bonege preparis tiujn gravajn akirojn, interesante la komercistojn al niaj aferoj, dank'al la klopodoj de S<sup>oj</sup> P. Ahlberg kaj P. Nylén.

Tre meritata do estas la laŭdo donita de D<sup>o</sup> Zamenhof al nia Sveda kolegaro: « Mi ĉiam rememoras la tempojn, kiam Svedujo estis la centro de nia afero kaj mi restas konvinkita, ke dank'al la nova gazeto via lando baldaŭ denove fariĝos unu el la plej gravaj fokuso de la esperantismo. »

En FINLANDO, klopodas S<sup>oj</sup> Almar Harlin (Nyslott); Stadius; doktoro Runeberg; J. A. Wecksell; pastro J. Saïla. Nia kun-



VIZITO DE S<sup>o</sup> KAZI GIREJ EN BRUSELON (22/3/1903).  
J. Jamin. Nikola Kazi Girej. Lucien Blanjean.

(1) Unua societo, fondita en Varsovio la 1<sup>an</sup> de Decembro 1893 de S<sup>oj</sup> Jozef Wasniewski, Jan Janowski, Aleksander Blumental, Wilhelm Robin, Stanislas Goldberg — ne estis tiam permesita kaj devis ĉesi baldaŭ ĉian agadon.

laboranto, Samppa Luoma fondis klubon kaj faras kurson en *Nurmijarvi*; aliaj ankaŭ ekzistas en *Helsingfors, Viborg, Iamersfors, Kemi, Nyväsksyla, Suursaari* kaj *Karkula*.

EN BOHEMUJO.

Ekspozicio aŭstria organiziĝas en Londono, okazonta tiun ĉi jaron.

La nacio bohema, kiu okupas sur la kampo de l' arto kaj de l' sciencoj unu el la plej altaj lokoj, estos reprezentata en tiu ekspozicio per aparta sekcio.

Tre grava kaj atentinda fakto estas ke la komitatoj de Praha kaj de Londono akceptas Esperanton por interkorespondadi kun elmontrantoj. Ni multe instigas niajn legantojn, kiuj rilatas kun lokala gazeto, enpresigi tiun sciigon. Oni ĝenerale ne rifuzas tiajn eletojn kaj per ripetado de tiuspecaj, oni, kun la tempo, devigas la plej skeptikulojn konfesi ke Esperanto ja disvastiĝas kaj estas praktika.

La grupo de Plzen, kies ĝenerala kunveno okazis la 25<sup>an</sup> de februaro, multe klopodis de sia fondo. Inter paroladoj publikaj de ĝi organizitaj estas citinda tiu farita de Soj Stanislav Kamaryt kaj Inĝo Eduard Kühnl en honora salono de « Mestanska Beseda ». La Prezo So Kutilek Xaver faris du kursojn sukcesintajn kaj nun, ĉiusabate, la anoj kuniĝas en la societa sidejo.

La grupo disdonis senpage 200 gramatikojn ke So Ĉeĵka kaj estas aktiva membro de l' Centra Internacia Pariza Oficejo.

*El raporto de KUTILEK XAVER.*

Nia agema samideano So Tabenski, sciigas nin, ke li ricevis jam multe da dokumentoj. La ekspozicio malfermiĝos la 14<sup>an</sup> de Majo kaj estos ĉiama. Ĉiuj do, kiuj havas iajn interesajn dokumentojn bonvolu ilin sendi. Estas organizota daŭra vendada kontoro por komercaĵoj reklamitaj per Esperanto. Estas dezirinde, ke tiu ĉi kontoro ĉiam pliriĉiĝu.

Adreso: So Vl. Tabenski, en Bieno Esperanto-Poŝto Ejzsinszki, Vilenska gub-Ruslando).

Pri tiu okazo, ni denove atentigas la esperantistajn komercistojn pri utileco de reklamo per Esperanto. Antaŭ ne longe germana cigarvendisto sciigis ke li ricevis tre ŝatindajn rezultatojn per esp. anoncoj; ni eksciis ankaŭ ke la grava firmo je farmaciaj specialaĵoj, Ferré Bltitière & Cie, atingis kontentigajn rezultatojn per la reklamo, kiun ĝi faris en tiu revuo por siaj bonegaj produktoj « Miéline Gelson », kaj « Remède d'Abysinie Exibard » tiu kuracilo sen konkuranto kontraŭ Astmo, la mizeriga malsano.

Kaj la rezultatoj estus certe pli bonaj se la samideanoj farus sian devon kaj aĉetus prifere la esperantaĵojn, jam tiel multaj. Sed mi ĝin scias per leteroj de komercistoj, multe alportas pri tiu vidpunkto la saman indiferentecon kiel pri esperantistaj revuoj kaj verkoj: estas apenaŭ kredeble, sed la rimarkinda verko Hamleto, majstra traduko de l' senmorta ĉefverko de l' granda Shakespeare, de l' elpensito mem de Esperanto, de Doktoro Zamenhof, apenaŭ vendiĝas!

Tio ne senkuragiĝas aŭtorojn kaj ni ricevis multajn novajn verkojn, pri kiuj estas parolate ĉi poste.

STELETO.

## Bibliografio.

V. N. Devjatnin: Verkaro. — D<sup>ro</sup> Rodet: Familles de mots. — D<sup>ro</sup> Mayer: Tridek Esperanto-lecionoj. — P<sup>ro</sup> Th. Cart: Esperanta radikaro. — Matton kaj Deligny: Lernolibroj. — Ĉefeĉ. Ahlberg, Sentis: Propagandiloj. — F. Zamenhof: Kompara frazeologio. — Schuck: Albumo de konataj Esperantistoj.

« Verkaro » de V. N. Devjatnin enrigas nin en la poezian kampon, kie, por ni, li kolektis kelkajn florojn: « Kvar Jartempoj — Si estas gaja — Dektria numero — Hetmano — Sur strato — Nevola morto — Ginto k. t. p. » havas ĉiuj sian propran ĉarmon kaj karakteron; « Najtingalo — Frosteto — Pastantoj » multe plaĉas al amantoj de malpezaj versoj. La volumo finiĝas per « Boris Godunov », dramo de Puŝkin kaj « Démono » orienta poemo, en kiuj la versisto montris plene sian talenton. V. N. Devjatnin versfaras kiel D<sup>ro</sup> Zamenhof, ne forigante la finajn literojn de vortoj en la intenco pliriĉigi la rimon aŭ pli fluigi la ritmon. Mi konfesas ke tiu maniero multe plaĉas al mi kaj la « Verkaro » montras ke ĝi, al kiu ni devas neforgeseblajn ĉefverkojn de nia majstro, tute taŭgas por la Esperanta versfarado (Hachette & Cie (1)).

*Familles de mots* (Familioj el Vortoj), de D<sup>ro</sup> Rodet, montras bone la riĉecon de Esperanto. Per iu radiko kaj afiksoj, la aŭtoro kunmetas ĉiujn eblajn vortojn. La verko estas do samtempe propagandilo kaj bonega gimnastikilo por komentantoj.

Ni ne povis ĝis nun paroli pri « *Tridek Esperanto — Lecionoj* » laŭ la Gouin-Metodo, de D<sup>ro</sup> Mayer, Sek<sup>o</sup> de la Esp. grupo de Manchester. La aŭtoro diras, videble prave, ke oni devas penadi lerni al komencantoj ne multe da vortoj sed taŭgan kaj ĝustan uzon de kelkaj substantivoj, kaj de multaj verboj elvokantaj ideojn pri kutimaj agoj, kaj li pravigvas sian diron per ekzemplo de infano rakontanta scenon viditan, kaj priskribanta detale la agojn de sama persono aŭ besto, t. e. uzanta multajn verbojn.

Al la profesoroj ni lasas la zorgon konkludi pri la praveco de l' aŭtoro opinio, kiu ŝajnas al mi tre ĝusta. (3)

« *Esperanta radikaro* » de Th. Cart, enhavas ĉiujn radikojn troveblajn ĉu en « Universala radikaro » ĉu kune en la franca, germana kaj angla, aŭ germana, sveda kaj hispana vortaroj. Kiam tiu vortaro estos plenigita de diversnaciaj ŝlosiloj, ĝi estos tute oportuna por la Esperantistoj, iafje haltigataj, dum siaj legadoj, per vorto ne trovebla en ilia gepatralingva vortaro. De nun ĝi tre utilos al Esperantistoj skribemaj kiuj ne devos uzi, krom tute deviga bezono, vorton ne troveblan en « Esperanta radikaro. » La volumeto, tre facile enpoŝmetebla, estas vendata por la propagando inter blinduloj. (2)

La Svedaj Esperantaj Ĉefeĉaj « *Ŝlosiloj* » trovis apud « Espe-

rantisten » la plej bonan akcepton. Certe estos same por la hispanaj.

La nelacigebla So P. Ahlberg eldonis broŝuron propagandan por Svedoj « Esperanto utan Lärare » kiu, same kiel ĉiuj eldonaĵoj de svedaj Esperantistoj, estas tute belege prezentita.

Ĝi enhavas plenan gramatikon, tekston en Esperanto kun la sveda traduko (Estu benata: Hinda legendo de H. Sienkiewicz, esp. de A. Grabowski), kaj difinon de Esperantismo. Tiu broŝureto estas vera modela por propaganda broŝuro (35 cent. ĉe P. Ahlberg, 37. Surbrunnsgatan, Stockholm).

Nun la ekslernantoj de multaj kursoj deziras siavice iĝi profesoroj. Estas do la momento por paroli iom pri lernolibroj. Ekzistas du, pri kiuj ni ne parolis antaŭe, kaj kiuj tute taŭgas ĉu por plualernado, ĉu por instruo.

La unua, de tre konata Esperantisto, Komandanto Matton, enhavas plenan gramatikon bonege prezentitan, kaj kiu povas esti tre utila por personoj dezirantaj havi la « tuton esperantan » en unu sola volumo.

Nur pri unu punkto (uzo de ĝis) la aŭtoro ne sekvas la regulojn de D<sup>ro</sup> Zamenhof; sed estas tre certe ke Ko Matton, aldo de l' « L. K. », forigos tiun eraron en venontaj eldonoj.

La dua libro, tute bonega por Francoj, precipe por kursoj farataj al personoj ne kleraj, estas ŝuldata al homo ankaŭ tre favore konata en Esperantistujo, kaj prave, So Deligny. Tiu lernolibro enhavas tute laŭdan antaŭparolon de P<sup>ro</sup> Cart kiu multe konsilas la verkon: « La lernolibro de So Deligny helpas, sen ia dubo, formi bonajn Esperantistojn: oni povas akordi al li plenan konfidon. »

Ni tute konsentas kun tiu juĝo kaj tute rekomendas la libron, tre malkaran (0 f. 70 ĉe « Tra la Mondo »).


La duaj kajeroj de *Frazeologio rusa-pola-franca-germana*, kaj de ĝia Esperanta aldono aperis. Kiel la unuaj ili estas tre interesaj kaj rekomendindaj al niaj samideanoj (5).

« Le triomphe de l'Espéranto est-il certain » Bonega franca propagandilo de nia sindona kaj lerta kunlaboranto H. Sentis, D<sup>ro</sup> de sciencoj, el Grenoble.

Baldaŭ aperos la « Albumo de konataj Esperantistoj »; ĝi enhavas 25 artfoliojn surhavantajn 5 aŭ 6 portretojn. Komentaria teksto estos en la komenco. Ankoraŭ unufoje ni tre atentigas niajn legantojn pri tiu albumo vere interesplena kaj tute taŭga por la propagando.

LEGADAMIKO.

(1) 2 f. 20 — Poŝlibro Internacia. 2 f. 20. — (2) 0,70 ĉe « Tra la Mondo ». — (3) 1 fr. ĉe F. d. G. Maréchal, B. A. Northern Institute (near Infirmary) Leeds, England. — (5) Ĉe l' aŭtoro M. F. Zamenhof, str. Nowolipki 43 Varsovo: Fraz. 1 f 25; aldono 0 f 50.



Kl. Trèves.

Milano.

LA KONSTRUADO DE LA GALERIOJ.

## La ekspozicio de Milano. Verkita de JAKOBO MEAZZINI (Italujo.)

Ĝi estas la granda okazantaĵo de 1906aj, kiu igos de la granda metropolo lombarda kvazaŭ la centron de la pulsado de la vivo itala.

La unua projekto pligrandiĝis, tiel ke dum oni pensis antaŭe kovri nur spacon je naŭdek mil metroj kvadrataj, reale hodiaŭ oni kovras spacon je 250,000 m. k, t. e. 120,000 m. k. plie ol en la lasta Ekspozicio de Lieĝo. La budĝeto, de kvar kreskis ĝis dek milionoj, iom post iom, dum la programoj de la diversaj montroj pligrandiĝis.

La galerioj de l' Ekspozicio ne mezuras malpli ol dudek kvin kilometroj. La konstruaĵoj estas preskaŭ ĉiuj jam ellaboritaj, tiel ke oni povas ekvidi kian grandecon havos la tuto en ĝiaj ckssteraj formoj.

Jen la honora enirejo kaj flanke la elmeto retrospektiva de la transportoj teraj kaj maraj kun l' « Acquario ». En la centro, la galerio pri la subtervojoj de *Sempione* kaj apude, la oficejoj de la gazetaro, de la poŝto kaj telegrafo kaj de la komitato.

Granda halo kondukas al la palaco de Belartoj, kiu havas centre la salonon de l' prezentadoj. Tuj post la « Arena » estas la konstruaĵo de la artoj ornamaj kun elmeto speciala de diversaj nacioj, kaj la stacidomo de la fervojo elektra, kiu kunigos la konstruaĵojn de l' Parko kun tiuj starigitaj en la militplaco.

En la militplaco, krom la elmetojn specialajn de kelkaj firmoj, oni havos la Galerion de l' laboro, konstruaĵo grandioza kaj monumenta, la elmetojn de Aŭtomobilismo, de Aerostatiko kaj la elmeton de la transportoj maraj, sur kiu staras majesta lumturo alta 60 metrojn, kiu lumigos la tutan ekspozicion. Tie ĉi estos ankaŭ la elmetoj de la kampokulturo, de la sanigado, de la fervojoj, kaj tiuj specialaj de kelkaj fremdaj urboj.

La ekspozicio sin prezentas do kiel granda kaleidoskopo, en kiu vidiĝos ĉiuj eksterajoj de la vivo intensa en la diversaj fakoj. Vere ĉiuj nacioj, escepte tre malmultaj, aliĝis; kaj nur je tiu vidpunkto la Elmeto atingos specialan intereson.

Paroli pri la kuriozaĵoj kaj specialaĵoj kiujn oni promesas,

estus por ni tro longa afero. Iaj ciferoj povos doni ideon sintezan al la legantoj.

La Galerio de laboro, ekzemple, estas kiel vastega laborejo de produktado kun vendejo ĉe ĉiu grupo de maŝinoj; la Fermo Krupp kunmetos ŝtalan turon turnigantan kun la necesaj paflegoj, la Navigacio (marveturado) ĝenerala elmetos la mehanismon kaj la funkciadon de transatlantiko; la ruĝa kruco germana elmetos tutan hospital-vagonaron; la ŝtato germana elmetos skvadronon da aŭtomobilistoj militaj kaj observejon acroveturar, kiu faros eksperimentojn sondajn en la aero per aerostatoj forjetitaj malproksimen je 5000 metroj. En la Pavilono de Belujo oni vidos la kuriozegan elmeton de la laborantoj de diamantoj; kaj la oraĵistoj elmetos pli ol dek milionojn da juveloj.

La kafejoj-restoracioj en la ĉirkaŭo de la ekspozicio estos preskaŭ centdudek kaj krom, oni havos multajn pavilonojn de amuzajoj: ekzemple, la bestejo de koloniaj bestoj transportaj, la strato de l' Kairo, spektakloj de batalado marvetura, kaj ankaŭ Buffalo Bill kun ĝia batalejo kaj ĝia militantaro.

Kaj la vizitantoj? Milano rajte sin preparas febre por ilin ricevi. La stratoj de la urboj estas veraj laborejoj ĉar oni renovigas kaj grandigas ĉion; oni preparas la loĝejojn, oni multe kreskigas la publikajn servadojn por fari inde la honorajn hejmajn eĉ al la gastoj tre nombraj kiuj ekloĝos en Milano dum la ekspoziciatempo. La grandega nombro de la elmetantoj, el kiuj multaj kondukis en Milanon tutajn rotojn da laboristoj, la nombrego de kongresoj, kiujn oni kunvokos en Milano dum la 1906a jaro, igas la problemon gravega.

Feliĉe, tiel la Administracio komunuma kiel la Direkcio de la granda Elmeto estas donintaj bonegajn esperojn, kaj oni povas esti certa pri la plej bona sukceso. Kiu venos tiuokaze Milanon, estos certe gasto bonakceptita.

JAKOBO MEAZZINI

el Arezzo (Italujo).





# DIVERSAĴOJ



## La Vivado de Teoplantisto en Hindujo

Verkita de Li mem.

Ni daŭrigas la interesan serion de plumpentraĵoj vigle, senfrazze skribitaj, kaj tamen tiel vivplenaj kaj kuriozaj, pri la vivado en hinda teujo.

Certe la korespondantoj de S<sup>o</sup> Simper, kiuj petis de li informojn pri tiu temo, partoprenos en la plezuro, kiun ni mem sentis kiam ni ricevis lian sendaĵon.

Ofte mi devas koleri — eĉ tre koleri — kontraŭ ili, pro ia eraro :

Alie, mi ne povus konservi al mi la necesan kontrolon. Protio, ankaŭ, la administranto, enirinte la plantejon, ĉiam sovaĝiĝas, kaj ofte bategas la kulkiojn. Jen mi pensas, « Hove! tio ĉi tre similas al la sklaveco! » Jen, kiam mi fruamaten rajdas tra la ĝardeno kaj nenia malfeliĉaĵo okazas ĉe la kulkio, mi pensas « Kia libera, glora vivado! »

La Dimanĉo estas libertempo. Ĉe la vendejo — neuzita ebenaĵo ekster la ĝardeno — la kulkio aĉetas tiom da manĝaĵo kiom estos sufiĉe por la estonta semajno. Tie ĉi vidiĝas multe da vilaĝanoj kun ilia rizo el la ĉirkaŭa regiono; kaj drap-vendistoj el malproksimaj partoj kun la multkoloraj katunaĵoj; kiujn tiel ŝatas la virinoj, kaj oni povas vidi kombilojn kaj speguletojn, subskribitajn sekve: — « Farita en Germanujo! » Tien ĉi, ankaŭ, en la varmmeta sezono, alvenas kelkaj membroj de la Tibet'a raso, nome anoj



Kopirajto.

VIZITANTOJ EL « BHOTAN »

de la proksima sed preskaŭ nekonata lando de Bhotan. Ili interŝanĝas fruktojn por rizo kaj diversaj fabrikaĵoj.

### La Granda « Puja ».

Je la okazo de la granda ĉiujara Hinda festego la kulkio dum kvar tagoj vestas libertempe. Tage kaj nokte, je la allogantaj kaj senĉesaj sonoj de siaj tamburoj, ili dancadas, multkolora vestitaj kaj per ruĝa pudro ŝmiritaj. Foje, ili arete marŝas al niaj domoj, antaŭ kiuj ili daŭrigas la dancadon kaj la baladojn, ĝis la ricevo de nia favorituloj arete venas, stato trudade enpenetras ies domon, oni estas devigata disdoni la arĝenterojn. Alie ili neniam foriĝus. Tiu ĉi maniero esprimi la religisenton, kompreneble, ŝajnas al la fremdulo tre eksterordinara!

(Daŭranta).

Originale verkita kaj ilustrita de ALFRED T. SIMPER,  
Y. M. C. A. New Branch  
144, Dhurumtollah st.  
Calcutta (India).



Kopirajto.

LA ĈIJJARA FESTO



Fot. Pourcines.

ELMIGRANTOJ SUR LA FERDEKŔO DE TRANSATLANTA ŜIPEGO.

Kopirajto.

## Enŝipiĝo de Elmigrantoj en Le Hâvre

Skizo de E. LEGOFFRE (Francujo).

..... Ĉiusabate, frue, tre frue en la mateno. Forlasinte dekstre la ĉefvojon, la longa vagonaro de l'elmigrantoj ekruliĝas nun sur la kajoj. Se la jam leviginta suno tion ebligas lumigante la scenon, aro da videmaj kapoj, ĉe la fenestroj de l' vagonoj, rigardas scieme la pejzaĝon. Jen aperas la nigra ŝipejo Vauban' kun sia ĉiama nubo de karba polvo; jen la veturilaro malrapide ruliĝas sur la malgajiga kajo Frissard' inter altaj magazenoj; jen al la vojaĝantoj montriĝas la ŝipejo de l'Eure' vasta akvujo kie majesta ruĝakamentuba ŝiparo altiras ĉies rigardojn. Nun la vagonaro trapasas kampon distrekitan de reloj, diskovritan per Amerikaj pakajoj, bareloj da oleo, pecoj de plugiloj, kaj transirinte ponteton, baldaŭ haltas antaŭ la halo de la Ĝenerala Transatlanta Kompanio. Tie finiĝas la surtera vojaĝo de la forpelitoj de la mizero.

Ĉiuj elvagiĝas, kun plezuro komprenebla kaj ŝatata de homoj kiuj ĵus vojaĝis 2-3 tagojn en malkomforta 3<sup>a</sup> klasa vagono. Ĉu rapide, viveme, salte, ĉu malrapide, lace, zorge, ili eliĝas unu post alia, premante per piedoj, je la lasta fojo eble, la Eŭropan teron, la senkompatan patrino, kiu devigas ilin forpatrujiĝi.

Kia ja kurioza vidaĵo, eĉ por la vidanto kiun la kutimo supersatigis. Ĉiuj landoj centreŭropaj havas tie riprezentantojn; Svisoj, Italoj, Germanoj, Bohe-

moj, Grekoj, Armenianoj, Bulgaroj, Rusoj, Aŭstroj, precipe troviĝas tie kunigitaj kvazaŭ en « postatura » Babilono. Ĉiuj parolas, krias, alvokas unu la alian, serĉas la kolegojn momente perditajn, provas rekuniĝi kun la samnacionoj, iras kaj venas, dum la oficistoj de l' kompanio, uzante ĉiujn rimedojn de multlingveco provas enirigi ilin sub la halon. Kia stranga koncerto, kies nur nova Mezzofanto povus fariĝi estro. Esperanto ja utilis!

Fine la vagonaro malpleniĝas, ĉiuj elmigrantoj staras nun sub la halo, kien fervojoficistoj alportas kaj amasigas la pakajojn kaj valizojn. Tie, ofte, simpla manĝo estas aranĝita sur altaj tabloj. Sen-ceremonie, la vojaĝantoj englutas, stare, varman supon. La simpla matenmanĝo estas tamen ŝatata de la elmigrantoj kaj rebonigas la stomakojn. Iom revarmigitaj, la vojaĝantoj amasiĝas inter bariloj kaj pasive atendas la momenton enŝipiĝi.

Tio, ŝajne tre simpla, ne fariĝas sen kelkaj postuloj. Antaŭ ol trapasi la ponteton, ĉiuj devas submetiĝi al iel malagrabra ceremonio; ni signifas pri « saneca ekzameno ». Pro la severa Amerika leĝo reganta la enmigradon, estas akceptataj en Unuigitaj Ŝtatoj nur sanuloj, tial, ĉar la ŝipkompanioj devas reveturigi Eŭropon (je sia elpezo) la rifuzitojn, oni komprenos kial oni tiel zorgas.

Sub la viglaj okuloj de l' doktoroj pasas ĉiu el-

La tre rimarkinda fotografajo de nia kunlaboranto, Inĝo Doko Pourcines, estas farita per bonega ĵumelo Bellieni.

migranto, kaj la sanecaj oficistoj precipe atentis pri la komunikemaj malsanoj de l' okuloj kaj kap-haŭto. Poste okazas la plej malagrabra parto de la ceremonio; ĉiuj nudigas la brakojn kaj ricevas..... inokulon kontraŭvariolan. La leganto mem prezentu al si la pentrandan karakteron de tiu sceno, kiun nia mallerta plumo ne povas priskribi kiel dece. Ĝi vidu la multkolorajn ĉifonojn, kiujn la senvestigo montras kaj ĝi aŭdu la kvindeklingvan koncerton de krioj, kiun la doloreta piko eligas el la gorgoj de l' sentemuloj. Estas senutile aldiri ke la doktoroj ne tiel admiras la scenon kiel la sciama rigardanto; oni ja tion komprenos se oni pripensas ke ili ekzamenas kelkajn centojn da homoj dum tre mallonga tempo, kaj la kutimo supersatigis ilin.

Sed la ekzameno alvenas al fino. Unu post la alia, la elmigrantoj eliras el la ĉambro kaj ordigas sin inter la lignaj kradoj, kiuj kondukas al la ponteto. La enŝipiĝo komenciĝas. Ĉiu prezentas sian bileton pasante kaj transiras sur la ŝipon. Tuj, servistoj direktas la elmigrantojn al la interferdeko, kie ili loĝos dum la vojaĝo. Oni povas aldiri ke la vojaĝantoj 3<sup>a</sup>-klasaj estas ĝenerale loĝigitaj kun samnacionoj, ĉar tio estas pli oportuna por la servado kaj evitas malkonsentetojn.

La loko kie la elmigranto pasigos la duonon de l' tempo estas eble inda je mallonga priskribo. Poŝt-ŝipo entenas kelkajn kuŝejojn el diversa amplekso, kiuj staras en la dua interferdeko. La pli vastaj estas difinitaj por familioj, t. e. viroj, virinoj kaj infanoj kune, la aliaj por virinoj solaj, aŭ por viroj. Granda elmigrantejo povas teni ĉirkaŭ 160-180 litojn kaj havas plankon ampleksan je proksimume 250 kvadrataj metroj. La vasta loko okupas la tutan larĝon de la ŝipo kaj estas limigita antaŭe kaj poste per laĵaj fakmuroj.

Interferdekoj fostoĵ subtenas du etaĝojn de feraĵ

### Nia enketo pri Edukado.

La libro de S<sup>o</sup> Southcombe pri la tutmondaj fajrokutimoj estas bonega ekzemplo de internacia enketo per Esperanto. Denove ni petas de niaj legantoj respondojn, kiel eble plej plenajn, al nia demandaro pri edukado, enpresita en la 6<sup>an</sup> non.

Ni jam citis landojn de kiuj ni ricevis raportojn kaj sciigojn; aliaj kaj fotoĝrafioj estas de tiam alvenintaj, sed tio ne estas sufiĉa por ebligis raporton plenan kiel postulas la temon elektitan. De Anglujo, kie oni miksis racionale la lernadon kaj la sportojn; de Danujo kaj Svisujo, kie oni multe zorgas pri edukado; de Svedujo, kie oni aparte zorgas pri la plibeligo kaj artistigo de l' lernaj ĉambregoj, ni dezirus sciigojn detalajn. De ĉiuj landoj cetere: eŭropaj kiel amerikaj, aziaj kiel afrikaj kaj oceanaj. Ĉiu bonvolu sendi plenan priskribon aŭ nur karakterizaĵojn, laŭ sia povo; kaj infanoj, kiel plenkreskuloj, lernantoj kiel profesoroj kaj instruistoj, partoprenu en la enketo; ni memorigas ke, se ĝi estas tia, kia ni deziras kaj povas esperi nun, ni ĝin aparte enpresos, kaj ĝi povos esti, per sia teksto kaj siaj ilustraĵoj, tre oportuna kaj valora propagandilo.

Inter fotoĝrafioj, ni ricevis tre kuriozajn de interno de lernaj ĉambregoj en bohemiaj lernejoj; tiaj vidaĵoj de aliaj landoj ebligas kompari utile tion, kion oni faras por la instruado per biĉdegaroj kaj muraj tabeloj, kaj por la « lecionoj pri aĵoj. »

Oni ne ŝanceliĝu pensante: «Certe oni jam sendis sciigon, kiun mi povus sendi; estas do senutile ke, miaflanke, mi ankaŭ ĝin donu»: en tia enketo, ju pli oni havas sciigojn, des pli la raportisto povas prave juĝi la aferojn; kaj la ripetado de l' sciigo estas pruvo de ilia ĝusteco. Nur povus plendi la enkantanto. Niaj legantoj ne devas havi la timon trolacigi lin. Nia sindona kaj klera kunlaboranto: P<sup>ro</sup> D<sup>ro</sup> Rousseau, deziras nur havi riĉan ŝtalon por interese raportu pri temo, kiu aparte devas atentigi la Esperantistojn.

A. M.

kadroj, al kiuj fiksiĝas tolaj fundoj; la litaĵo konsistas el dikaj lanaj kovriloj kaj kapkusenoj: jen la litoj, simplaj sed puraj kaj facile dispecigeblaj en la okazo kiam la vojaĝantoj mankas; tiam la interferdeko estas uzata kiel restejo. Krom la litoj, kelkaj lignaj tabloj kaj benkoj konsistigas la tutan meblaron de tiu loko, kiu estos indiferente kuŝejo, manĝo-ĉambro kaj salono de la nericiĝaj vojaĝantoj.

Fine, ĉiuj elmigrantoj enŝipiĝis. Ekzameninte la kuŝejon kaj zorge rimarkinte la lokon kaj numeron de sia lito, preskaŭ ĉiuj resuriras la supran ferdekon. Tie, jen stare aŭ side, jen marŝante, ili atendas la horon, scieme rigardante la antaŭekiran movadon: enŝipiĝo de kestoj, pakajoj, valizegoj, dum ĉirkaŭ la ŝipo aro da vendistoj en boatoj provas aĉetigi de ili siajn komercaĵojn: oranĝojn, vinon, bieron, bulkojn, kolbasojn kaj eĉ faldeblajn seĝetojn, kiujn ili proponas al la elmigrantoj en korbeto fiksita ĉe l' ekstremaĵo de longa kano.

Nun la horo de l' ekveturo alvenas. La lasta ponteto estas formetita kaj ĉiuj ŝipanoj staras ĉe sia deĵorejo. La ronkado de la superpremaj klapoj akordiĝas kun la muĝo de l' fajfilego. «Antaŭen malrapide!» La ŝipo delasas la kajon, majeste turniĝas rektangule kaj trapasas la pordojn de la ŝipejo Apogante sin al la balustrado, la elmigrantoj rigardas la postflugantajn konstruaĵojn de l' antaŭhaveno. Baldaŭ la digo mem estas postlasita kaj la ŝipo eniras la grandan maron. Ankoraŭ unu halteto por ke la piloto elŝipiĝu, kaj la vera vojaĝo komenciĝas.

Bonan vojaĝon al vi, formigrantoj! La sorto estu al vi favora kaj via nova patrujo estu pli kompatema ol tiu kiun vi nun forlasas!

Originale verkita de E. LEGOFFRE  
el Le Havre (Francujo).

### Homaranismo.

Nia bonega kunfrato « Ruslanda Esperantisto » eldonis aparte la dogmojn de *Homaranismo* (Hilelismo): de la vorto « Homarano », kiu signifas « membro de la ĉiuhoma familio ».

La homaranismo estas instruo, kiu, ne deŝirante la homon de lia natura patrujo, nek de lia lingvo, nek de lia religiano, donas al li la eblon eviti ĉian malverecon kaj komunikigadi kun homoj de ĉiuj lingvoj kaj religioj sur fundamente neŭtrale homa, sur principoj de reciproka frateco, egaleco kaj justeco. La homaranoj esperas, ke per konstanta komunikigado sur la bazo de neŭtrala lingvo kaj neŭtralaj religiaj principoj kaj moroj, la homoj iam kunfandiĝos en unu neŭtrale-homan popolon, sed tio ĉi fariĝados iom post iom, nerimarkate kaj sen ia rompado. »

Kiel estas dirite en la broŝuro mem, oni ne devas intermiksi la homaranismon kun la Esperantismo!

Ambaŭ ideoj estas tre parencaj inter si, sed tute ne identaj. Oni povas esti bonega Esperantisto kaj tamen kontraŭulo de la homaranismo. Sed ŝajnas ke oni ne povas ne konatiĝi kun la dogmoj de homaranoj. Oni ilin trovos ĉu en la broŝuro, senpaga, ĉu en la unua numero de « Ruslanda Esperantisto » kio estos okazo konatiĝi kun tiu interesa revuo. (Jan<sup>ro</sup> 1906).

« TRA LA MONDO ».

Dum la korektado de l' presprovaĵoj de tiu ĉi, S<sup>o</sup> Rousseau, 1, Faubourg de Bouze, Beaune (France), inter aliaj dokumentoj, ricevis de nia fervora samideano, generalo Levitskij, interesan rakonton pri la vivado en virma Peterburga instituto. Li anoncas aliajn pri milita rusa lernejo. Siaflanke, nia itala kunlaboranto, Gr<sup>o</sup> A. Gallois, sendos ankaŭ raporton pri itala milita lernejo.

Nia enketo promesas do esti tre interesa. Ni petas niajn kunfratojn bonvoli atentigi siajn legantojn pri ĝi, sciigante ke ni sendos senpage ekzempleron de l' numero enhavanta la demandaron pri la enketo, al tiuj kiuj deziras partopreni en ĝi.

« T. L. M. ».



# ARTISTA AŬ LITERATURA VIVADO



## Jaroslav Kocian

Verkita de FRANT. K. SVACINA (Bohemujo).

Unu proverbo prave diras: « Kiu estas Bohemo (Ĉeĥo), tiu estas ankaŭ muzikisto ». Vere, bohema nacio estas tre kantama kaj muzikama. La bohemaj muzikistoj estas ĉie sur la mondo dissemitaj, ne nur en Eŭropo, sed en ĉiuj mondanguloj. Bohemaj popolaj melodioj havas lokon inter la plej belaj el ĉiuj slavaj melodioj. Kiam en la 1892<sup>a</sup> jaro estis aranĝita en *Vieno* internacia teatraĵa ekspozicio, akiris tie la bohema opero la unuan premion. Same en la 1900<sup>a</sup> jaro en *Parizo* kaj en *Bruselo* venkis la bohema kanto. Laste dum la pasinta jaro (1905<sup>a</sup>) prezentis sin eminente la bohema kantsocieto « *Smetana* » el urbo *Plzen* en Belguja *Verviers*. Post ĝia aŭdado elleviĝis la kantjuĝistoj (profesoroj de diverslandaj konservatorioj) kaj entuziasme aplaŭdis. Bohemaj kantistoj aldonis ankoraŭ eterne belan boheman nacian himnon « *Kde domov můj?* » (= Kie estas mia patrujo?) Post tiu ĉi kanto proklamis la kantjuĝestro, ke bohema societo ricevas la plej unuan premion. La 10<sup>an</sup> junion 1905 vizitis multaj eminentaj anglaj ĵurnalistoj diversajn bohemajn urbojn inter alie eĉ urbon *Kutna Hora*. Tie, en memorinda katedro, ili estis tiom ravigitaj per la antikva historia bohema horalo « *Svatj Václave!* », ke ili tuj petis ne nur ĝian ripetadon, sed ankaŭ ĝian anglan tradukon, promesante, ke ili enkondukos tiun belan melodion en anglajn preĝejojn. Kompreneble, ilia peto estis plezure plenumita. Cetere, skribi pri bohemaj kantoj mi ne celas en mia artikoleto, sed mi penas nur konatigi karajn gelegantojn kun eminenta bohema violonvirtuozo JAROSLAV KOCIAN. Jaroslav Kocian estis naskata la 22<sup>an</sup> de februaro 1883<sup>a</sup> en bohema urbeto *Usti nad Orlici*, kie estas lia patro, popola instruisto. La Juna Jaroslav ricevis bonegajn fundamentojn de violonludo de sia patro, muzikisto.

Baldaŭ poste, li studis en muzikkonservatorio en *Praha* apud eminenta kaj nun mondkonata profesoro *Otakar Ševčík*. Jam unua memstara koncerto de Jaroslav Kocian en *Praha* montris, ke tiu ĉi talentplena junulo plimultigas la vicon de bohemaj

violonvirtuozoj. Poste li koncertis preskaŭ en ĉiuj ĉefaj eŭropaj urboj kaj ĉie per sia alta arto venkis; ĉie unuanime oni diris kaj skribis, ke li estas neatingebla virtuozo. Precipe glorplena estis lia apero en Londono kaj en ĉefaj amerikaj urboj. Per siaj koncertoj enpaŝis do juna Kocian en vicon de mondaj virtuozoj kaj hodiaŭ li estas ankoraŭ kun *Fr. Ondříček* kaj *Jan Kubelik* (ankaŭ ambaŭ Bohemoj) la plej eminenta bohema violonvirtuozo. En Rusujo proklamis lin aŭtoritatuloj — kaj mem *Safanov* — granda artisto.



JAROSLAV KOCIAN  
Eminenta bohema violonvirtuozo.

En suda Italujo trovis Kocian vere fabelan sukceson, ĉar tieaj muzikgazetoj unuvoĉe nomis lin « *dua Paganini* ». En Italujo, en la hejmo de la plej granda virtuozo Paganini, signifas multe por Kocian tia flata aljuĝo: la superecon super ĉiuj ceteraj virtuozoj. Italaj muzikaj eminentuloj ankaŭ invitis nian Kocian en urbon *Genua*, por ludi tie sur la memorinda violono de majstro Paganini. Tiu ĉi mondkonata violono estas enmetita kiel malofta « sankta restaĵo » en aparta ujo, kiu estas sigelita per urbaj sigeliloj. Al tiu ĉi historia momento estis invititaj nur eminentuloj; la violono estis ceremonie eltirata el urno kaj pruntata al Kocian por ludi. Antaŭ tiu ĉi eminenta publiko en naskurbo de Paganini ludis Kocian dum tutaj 2 horoj, kaj ĉiuj estis tre ravigitaj kaj kiel ensorcigitaj.

Post la sorĉa ludo estis la historia instrumento refoje enmetita en la urnon kaj sigelita. Tiun ĉi momenton oni duoble protokoligis kun subskriboj de ĉiuj partoprenantoj: unu protokolo estis metata en la urban arkivon, duan protokolon ricevis Kocian. Kocian estas ankaŭ talenta muzikverkisto kaj volonte aldonas propran verkon al ceteraj punktoj de Koncertprogramo. Kun li ankaŭ koncertadas la plej eminenta bohema fortepianvirtuzino, fraŭl. *Markéta Volavá*.

Por « *Tra la Mondo* » speciale verkita  
de FRANT. K. SVACINA,  
faka instruisto (Bohemujo).



# FELIETONO

## La Torento el Saŭmo

Originalo de DANIEL LESUEUR (Francujo) (1).

Li proksimiĝis, pensante kaj revante: « Ĉu si koleretos? »

Ho! Ŝi tre rapide pardonos al mi, kiam ŝi scios, ke tio estas por diri adiaŭ al ŝi. Adiaŭ... Kiel bedaŭrinde estas!... Tiuj belaj okuloj ne deziris malbonon al mi. Tiuj dolĉaj lipoj.... »

Impreso de fulmofajro ĵus interrompis la tenteman revadon. Tio estis tiel rapida, ke Jako ne komprenis kaj tamen, li restis tie, staranta en la nokto, senmovigita de eksterordinara impresio. Nu!... kio okazas al li? Li tamen estas brava. De kie venis la senteraro kies frapon sentis lia animo. Fulmo eble... La ĉielo ekmalheliĝis. Sed tamen sekvis nenia tondrado.

Subita kaj viva lumo ĵus iluminis la monton, envolvis Jakon, poste estingiĝis. Klare, je cent paŝoj de si, li estis vidinta la domon de Nello. Eĉ, ĉe fenestro, li estis kredinta rekoni la kapon kliniĝintan de Veroniko. Ĉu lia ama frenezo estas tia, ke ĝi konfuzigis la kapablojn de liaj sentoj?

Mirigita, la pentristo turnis sin al la lago, ekzamenis la vidigon de l' elementoj. Kion li vidis, tio lin plenigis je maltrankvileco.

Tra la pejzaĝo kovrita de l' nokto, stranga radio moviĝis. Peniko el viva lumeco kiu, ŝajne, devenis de l' promontoro de Bellagio, plilarĝiĝis en la nigra atmosfero, kiun ĝi igis ankoraŭ pli nigra. Tio rapide trairis la lagon, naskigante aperojn de veloj, tuj malaperantaj. Poste, tio subite turniĝis. L'argenta fasko, direktita al la bordo, al la krutajoj, vidigis la blankecon de l' domoj, la ŝtonegplenajn malglataĵojn de l' bordo, aŭ la veluran supraĵon de l' abioj, kies delikataj reliefoj montriĝis kun mireginda klareco.

« La ŝipo de l' financo!... » murmuris Jako. Li rememoris tiujn landterminojn, laŭ klarigoj donitaj de kelnero en Lugano, kie li restis antaŭ ol fiksi sin en Varena. Sur la lago de Côme, li ne estis ankoraŭ vidinta funkciadi tiun aparaton de l' itala akcizo. Boato, kiu, malgrande, kvazaŭ havas formon de torpedosipo, sin metas ĉe ian lokon de l' lago, kaj de tie, evoluciigas potencon elektran lumjetilon. La luma radio, esplorante la angulojn de l' bordo, la kurbigojn de l' montoj, klare vidigas la trompemajn manovrojn de l' boatoj sen lanterno, de mulistoj ŝarĝitaj de suspektaj ŝarĝoj, kiuj penas transiri la svisan landlimon ne turnante l' atenton al si. Sen tiu lerta rimedo, estus neeble observadi tiun landlimon, kiu zigzagigas super l' akvoj, kaj altestaras sur la cimoj. Tuj kiam la denuncema lumeco estas malkaŝinta ian suspektindan manovron, boato bone armita, cetere ĉiam preta, disiĝas de l' falsa torpedosipo de l' akcizo, aŭ signalo ekflugas al posteno de l' altaĵoj, kaj la kulpuloj estas tuj

persekutataj. Iafoje ne bezonas atingi ilin. Multaj, timigitaj de l' senkompata lumeco — kiu eltrovinte ilin, sin fiksas sur ili — lasas sian pakegon en la vojo, aŭ ĵetas ĝin funden de l' lago, tiamaniere ke iliaj persekutantoj ne povas konstati ilian kulpecon.

En tiu ĉi momento, Jako Ferneuil, la korekta Parizano, sentis en si la timigitan animon de unu el tiuj malbonuloj. Ne kuraĝante paŝi antaŭen nek malantaŭen, li observadis la longan brilegan blankecon. Viva kaj kaŝema, ĝi foriĝis de iaj lokoj por subite reveni tien per fulmofrapanta ĵeto. Ĝiaj neatenditaj efektoj metis fantomaĵojn en la pejzaĝon. Ĉu ĝi revenos al li? Kia ebleco estas por ke li estu rekonata de l' boato? L' akcizestro certe havas fortan lorneton. Sed kiu estas li? Nello havis galonojn sur la maniko. Se tiu estus li!... Se li tuj rekonus lin!... Por ĉiuj ceteraj, Jako estis neofendema promenantanto. Sed por la frato de Veroniko!...

Kion fari? Malsupreniri ne vidinte la junulinon? Tiam decidon Jako ne povis preni. Aliparte, la vojo sur kiu li troviĝis, tre malkovrita kaj nudigita, apud la ŝtonego, prezentis rifuĝejon nur tre malproksime malantaŭ li. Dum antaŭe, la domo mem de Nello ŝirmus lin kontraŭ la vidado de l' akcizistoj. Li do ekkuris al tiu direkto.

Li ne estis farinta dek paŝojn, ke, de l' fundo de l' lago, la radio sin jetis al li. La elektra gerbo balais la monton, blindigis Ferneuil, malproksimiĝis, poste revenis kaj, tiun fojon, ne plu forlasis lin. Ĉirkaŭ li, estis lumeco pli viva ol la taglumo. Li distingis ŝtonojn ĉe siaj piedoj, floretojn sur la kruta deklivo. Trans tiu zono, malluma muro. Instinkte, li sin turnis al la punkto, de kiu ŝprucis la terura lumo. Ĉu li kredis rekoni tiujn spionantajn lin?... Liaj palpebroj moviĝis. La brilo estis netolerebla. Ferneuil daŭrigis marŝi. Li provis pensi: « Mi ekzameni l' aferon... Ĉu estas ja mia persono, kiun oni tiele observadas? ». La luma kampo ne lumigis al li sola. Sed li vane antaŭeniris, li ne sukcesis eliri el ĝi. Ĉu?... Li rapidigis sian paŝon. Teruro!... La radio alligis al li. La radio sekvis lin!...

Afero, kies korporemon oni ne povas imagi. Marŝi sur tiu monto fariĝinta nevidebla, subite kovrita de nokto, vaporiginta en monstra mallumo. Kaj sur si mem, vidi disfluantan supernaturan klarecon, persistan obstineman klarecon, malmoderan kiel elemento, artifikan kiel la homa malboneco.

Jako Ferneuil komprenis la senkuraĝecon de l' kontrabandistoj, kiuj ĵetas siajn negocajojn kaj sin kaŝas en la unuan truon. Antaŭeniri en tiaj kondiĉoj sur hazarda vojo, de kiu li nenion distingis trans la brilega reto, en kiu li troviĝas kaptita, estis materiala turmento.

(Daŭronta)

JOHANINO FLOURENS.

(1) Sekvo — Vidu la 9an Non (Marto).

## Ĉiam pri Katalunujo.

« Suno Hispana » daŭrigas sian sistemon, konsistantan supektindigi kunfraton pro ĝia sintenado en ia afero, ne konigante klare ĉi tiun al sia legataro. Fidelaj je nia farmaniero ni, kontraŭe, donas ĉi sube la « elementojn de la proceso ».

1<sup>e</sup> Enpresio, en « Tra la Mondo » de artikolo de Katalano, juĝita malvera kaj ofenda de Hispanoj (Decembro 1906); —

2<sup>e</sup> Bedaŭroj private esprimitaj kaj propono por enpresio de responda letero;

3<sup>e</sup> Pro diversaj kaŭzoj *skribitaj al S. R. Codorniu* — kiu, kiel Pr<sup>to</sup> de la HS p E prenis sur sin la aferon, aparte pro ripetita kaj ofendanta peto pri malestiminda denuncio, anstataŭo de la responda letero per artikolo subskribita de mi, per terminoj tre simpatiaj por la ofonditoj (Januaro 1907).

4<sup>e</sup> Nekontentigo de interesatoj: enpresio « en Suna Hispana » de la linioj cititaj en la lasta numero de « Tra la Mondo » kaj sendo de la ĉi suba, letero al la redaktoro de ĉi tiu lasta revuo.

Estimata Samideano,

» Okaze la mallaŭdinda artikolo presita en la paĝo 83 de Tra la Mondo kaj titolita Katalunujo, vi petis al S<sup>ro</sup> Inglada, ke li sendu al vi la decan proteston por presigi ĝin. Mi tion faris je la nomo de la hispanaj esperantistoj, kaj nun mi ree petas ke vi presigu en via gazeto kion mi subskribis kaj sendis al vi por tiu celo, ĉar tio estas nepre necesa por ke la afero trovi la decan solvon, ĉar ne estas sufiĉaj la klarigoj presitaj en la paĝo 101<sup>a</sup> »

Murcie, 10 III 06.

Via Sindone,  
R. CODORNIU

5<sup>e</sup> Respondo farita:

Estimata Samideano,

Mi pensis ke la afero estas finiĝinta pri Katalunujo per la neveraj diroj de « Suno Hispana » pri senkulpigoj pretendite faritaj. Via letero montris al mi, ke mi eraris.

Mi devas sciigi al vi, ke, se mi enpresos la leteron vian, mi komentarios ĝin kaj la tutan aferon, kaj ke mi ĝin akompanos per traduko de nacilingvaj artikoloj pri la malpacoj en Barcelone kaj per ilustraĵoj montrantaj detruojn de katalanistaj presejoj. Mi lasas al vi la zorgon juĝi se tiaj aferoj povos esti utilaj al Esperanto kaj al la hispanaj esperantistoj. Kompreneble ankaŭ mi aludos pri la ekzilo de unu Katalano, pri kiu

parolis multaj revuoj esperantistaj, kaj kiun mi ne volis aludi pro delikateco kaj ĝentileco, kaj tiu montris kiamaniere vi aplikas la principon diritan de vi en via nova jarlibro ke, per Esperanto, ĉiuj internaciaj malpacoj malaperos! Se vi persistos deziri enpreson de via letero, sciigu min per unu vorto *kiel eble plej frue*, ĉar mi preparas la venontan numeron.

27 III 06.

Via Samideano

A. MONTROSIER.

6<sup>e</sup> Jen estas la sola respondo ricevita:

Al « Tra la Mondo » — « Bedaŭrinde ni devas ankoraŭ paroli kelkajn vortojn pri io malplaĉa por nia afero. Ni ne petis de S<sup>ro</sup> Montrosier senkulpigojn, ni nur sendis al li verajn sciigojn laŭ lia peto, sed li, malgraŭ siaj privataj promesoj, ne publikis ilin.

Niaflanke la ofero estas tute finita, eĉ forgesita, sed ni jam sufiĉe scias pri la *senpartieco* de « Tra la Mondo ».

« Suno Hispana » (Aprilo 1906).

Ni opinias ke « Tra la Mondo » povas nur malprave esti kulpigata de partieco, post legado de tiu elmonro de l' faktoj, plena kvankam resumita, kaj senigita de l' tedaj detaloj kaj malagrablaj postuloj, kiujn oni volis altrudi al mi.

Ia fakto estas atentinda: oni agis kontraŭ esperanta organo kiel oni ne estus aginta kontraŭ ianacia organo! Ĉar mi ne kredas ke la Hispanoj skribis al la ĵurnaloj de l' tuta mondo por peti klarigojn aŭ sendi postulojn pri artikoloj raportantaj la katalunajn aferojn.

Farinte la neceson, mi ne volis lasi altrudi al mi pluajn postulojn. Tiel agante, mi defendis la rajtojn de nia tuta gazetaro; kaj precipe por ĝi, kiu bezonas koni ĝuste kaj plene la faktojn de ĝi juĝeblajn, mi volis detale elskribi pri la ĵus priskribitaj, kiel respondo al la lasta skribo de « Suno Hispana ».

Tute egalaj estas por mi la interesoj de Hispanoj kaj Katalanoj pri iliaj internpolitikaj malpacoj. Senpartia, do, mi estis kaj restas. Sincere ankaŭ mi deziras la finon de tiu intergazeta diskuto; kaj nia hispana kunfrato estus facile povinta ne fari kontraŭ ni senfundan kulpigon.

Tio ĉi dirita, volonte ankaŭ ni forgesos la aferon, *pri kiu ni ne plu parolos*.

A. MONTROSIER.

## Ĉirkaŭ la Kongreso.

Ni estu praktikaj. — Restado en la Alpoj. — Esperantistaj someraj kolonioj. — Progresemaĵ hotelistoj.

Ni jam parolis pri la militiro fruktoportonta komencita de kelkaj praktikaj homoj por atentigi la hotelistojn, kaj tiujn vivantajn de turistoj, pri Esperanto.

La afero estas en tre bona situacio, dank' al la penadoj de kelkaj sindonemaj homoj: S<sup>ro</sup> P<sup>ro</sup> Th. Rousseau, unu el la plej varmaj kun P<sup>ro</sup> Ch. Lambert, el Dijon, al mi sendis interesajn sciigojn, resumeblajn jene:

En Francujo, la grava Societo Sindikala de la Hotelistoj de Alpoj kaj Rodana valo (Association Syndicale des Hoteliers des Alpes et de la Vallée du Rhône), kiu havas multajn anojn en Francujo, Svisujo kaj Italujo, donas sian tutan apogon al nia afero. Ĝia oficiala organo presis jam du longajn artikolojn de P<sup>ro</sup> Rousseau pri nia lingvo, kaj kurso pri Esperanto komencis la 1<sup>an</sup> de Majo, de li ankaŭ.

Dank' al tiu grava helpo, multaj hotelistoj legantaj la ĵurnalon jam lernas Esperanton, aŭ ĝin lernigas je siaj oficistoj.

En Svisujo, la supre aluditaj artikoloj faris grandan impreson, aparte en Genevo: la mastro de l' Hotelo Victoria parolis pri ili en la kunveno de la Societo de la ĝenevaj hotelistoj; tiuj ĉi tuj donis sian apogon al kurso por hoteloficistoj farata de S<sup>ro</sup> P. Berthelot, el Esperanto-Ĵurnalo, en Genevo. Aliparte, la sindona kaj aktiva Prez<sup>to</sup> de l' S. E. S., pastro Schneberger, parolis pri la afero en la ĝenerala kunveno de l' Svisaj esperantistaj grupoj, kiu okazis en Olten la 15<sup>an</sup> de Aprilo.

### Teruraj Katastrofoj.

Apenaŭ estas preterpasinta la kortuŝeco instigita de l' katastrofo de Courrières, kaj jen novaj kaj teruregaj malfeliĉaĵoj. Ankoraŭ la malnova tero ilin kaŭzis, frapante same la malnovan mondon en la ĉirkaŭoj de l' plaĉa Napolo, kaj la novan en la tuta Kalifornio, detruante aparte l'urbegon San-Francisko.

En alia ideofako, la bedaŭrindega morto de l' fama scienculo, Pro Curie, funebrigas la tutmondon, frapante aparte la francan sciencularon.

Francujo, fine, estas terure tuŝata de strikoj en la Norda minregiono. Tiuj strikoj restos admireca kaŭzo por la heroismo montrata de l' francaj oficiroj, kiuj, ĝis nun, sukcesis eviti batalojn inter la strikantaj kaj siaj soldatoj, ne permesante al tiuj ĉi pafi. Tamen sufiĉe multe da ili estas vunditaj gravege, eĉ morte!

Al la suferintoj de ĉiuj tiuj katastrofoj, ni sendas nian respektan saluton.

21<sup>an</sup> de Aprilo

« TRA LA MONDO. »

# MIKSAĴOJ.

## Esperantaj ŝlosiloj.

Mirindaj broŝuretoj ne pezaj (5 gram-ojn), enhavantaj regulojn de Esperanto kaj « vortaron ebligantan tuj kaj senpre-pare deĉifri kaj legi ĉion esperante skri-bitan » Enmeteb-laj en leteron sen pliigo de la poŝtkosto.

Jam estas pretaj la angla, germana, franca, itala, sveda, hispana eldonoj kaj riceveblaj po

**3.50 frankoj la centon (100).**

Tre rekomendindaj por la propagando. Ĉiulandaj poŝtsignoj estas akceptataj laŭ la efektiva valoro.

Proponu tiun tekston por traduki al personoj kapablaj interesiĝi je Esperanto, donante samtempe la gepatralingvan Ŝlosilon » de S<sup>ro</sup> Ĉefeĉ.

LA SONOR'IL'BIRD'O. — Oni renkont'as en la arb'ar'o'j de « Guyanne » bird'o'jn tre fam'a'jn ĉe la Hispan'o'j, je l' nom'o de « Campanero » aŭ sonor'il'bird'o. Ĝia voĉ'o, cetere, est'as sonor'a kaj delikata kiel son'o de sonor'il'o. Ĝi aŭd'ig'as je unu hor'o de inter'spac'o Nenia son'o, nenia kant'o kaŭz'as mir'o'n tian kia tiu produkt'at'a per tint'-voĉ'o de « Campanero ». Ĝi kant'as vesper'e kaj maten'e. Kiel la pli'mult'o da bird'o'j; je la tag'mez'o ĝi ankoraŭ kantas. Tint'o klar'a de sonor'il'o aŭd'ig'as, paŭz'o unu'minut'e sekv'as, du'a tint'o, nov'a tint'o de sonor'il'o; fin'e tri'a tint'o sekv'at'a de silent'o de ses aŭ ok minut'o'j. Tiu bird'o estas dik'a kiel garol'o. Sur ĝi'a kap'o star'ig'as tub'o konus'form'a, bril'nigr'a, kun plum'et'o'j blank'a'j, kiu komunik'as al palat'o kaj, kiam ĝi est'as aer'plen'a, ĝi ŝajn'as spik'o'. La esplor'-ist'o Jacques Arouet (Ĵak Arue) al'port'is kun si du el tiu'j bird'o'j kiu'jn li donac'is al Pariz'a Muzeo pri natur'a historio.

(Almanach du Bresil Republicain).  
Tradukis n<sup>o</sup> 7068.

### PROBLEMO 41<sup>a</sup> (DE MARCELÉ).

Mia unua duono  
En roztempo montriĝas.  
Duan tre ŝatas fripono  
Kaj saĝulo negliĝas.  
Tuton, se serĉi vi provos,  
En armeo ĝin trovos.

### PROBLEMO 42<sup>a</sup> (DE ALI-BEN-CRUSTERJEN).

Mi estas manĝaĵo tre konata; se vi intermiksas min, tuj vi vidos virinan ornamaĵon.

### PROBLEMO 43<sup>a</sup> (DE J. FLOURENS).

Mi estas ero de libro; sen kapo kaj sen ĉapelo, mi fariĝas fero.

### PROBLEMO 44<sup>a</sup> (DE LA SAMA).

Mia unua kaŭzas suferon, mia dua estas akva kreskaĵo; mia tuto, nomo de korpa parto.

### PROBLEMO 45<sup>a</sup> (DE MI).

• • • • • birdeto  
• • • • • sin montri  
• • • • • maŝaro  
• • • • • metalo  
• • • • • pronomo  
• • • • • vokalo

### PROBLEMO 46<sup>a</sup> (DE CH. BRUNET).

Mi estas koloro kaj intermiksita mi estas manĝaĵo. Divenu!

## Diversaj sciigoj.

Ĉe « Ruslanda Esperantisto ». — Lia administracio sciigas ke, pro la kruela kaj senkompatema reakcio reganta nun en Rusujo kaj Polujo, ĝi opinias prudente ĉesigi la presadon de sia interesa Social-politika fakoj. Kaj ĝi, bedaŭrinde, ne daŭrigas la tiel teruran « Ruĝa Rido » pri kiu ni intencis raportoj.

Ankaŭ ĝi petas la aliajn revuojn prokrasti la presadon de skizoj el la politika rusa movado ĝis pli favora tempo...


Por alkonformigi nin al tiu deziro, ni nun ne enpresos la anoncitan artikolon de D<sup>ro</sup> Morgan pri « La Rusa Bastilio ».

« Esperanto-Ĵurnalo ». — Pro diversaj malhejoj, ĝi ĉesas aperi dum kelke da tempo. La nova adreso de S<sup>ro</sup> P. Berthelot estas: Esperanto-Ofice, 15, Quai de l'Île, Genève. Avizo al la mutualistoj.

La « S. f. p. E. » — « L'Esperantiste » sciigas pri favora vojaĝo de S<sup>ro</sup> de Beaufort en Italujo dum kiu li faris, en Italujo kaj Francujo, multajn paroladojn. Siaflanke S<sup>ro</sup> T. Cart daŭrigas sian fruktoportan agadon en la militistaro, ne ĉesante paroladi ankaŭ en diversaj urboj.

Tiu aktiveco de 2 el la estroj de la S. f. p. E. havos certe la plej bonan influon por la antaŭenirado de nia afero

### Solvo de l' problemo 19<sup>a</sup> (POR KRISTNASKO).



Sufiĉis tranĉi la rektangulon per 8 strekoj havantaj nur longon = 6/8 de la larĝo de la rektangulo; faldi poste la parajn kaj neparajn banderolojn laŭ du paralelaj linioj, tiamaniere ke oni apudmetu la taŭgajn literojn. La rezultato estas supre. Kompreneble la tranĉaĵoj ne tuŝas la kadron.

Preseraro montris T anstataŭ K ĉe angulo dekstra kaj supra; sed la malfacileco estis sama por ĉiuj divenintoj.

Por tiu ĉi problemo mi nur ricevis 5 solvojn kaj ĉiujn ne tute ĝustajn principe. La 5 gedenintoj estas Fraŭlino Dumezil kaj Castro, sinjoroj Gambier, Fimet kaj Warden.

La lotmontrado montris Fraŭlinon Castro kiu gajnas la premion « Duonjara abono de TRA LA MONDO ».

Ĉi tiu fraŭlino estas petata diri al mi kion mi devas fari pri ŝia gajnaĵo.

**Rimarko:** La solvoj estos akceptataj ĝis la 30<sup>a</sup> de junio 1906<sup>a</sup>

**Esperanto en Militistaro.** — La grava kaj belega franca milita revuo « Patria » ĵus komencas (1<sup>an</sup> de Majo) serion da artikoloj pri Esperanto, de l'agema milita pioniro esperantista, leŭt<sup>o</sup> Bayol, instruisto en la speciala milita lernejo « St Cyr ». Lia aktiveco ne sin limigas tie, kaj li verkas ankaŭ multajn artikolojn en aliaj gravaj ĵurnaloj.

Siaflanke S<sup>ro</sup> Cart enpresigis 2 artikolojn en « La France militaire ».

**Nacilingva gazetaro.** — Bohema « Rozhledy po Lidu-milství » reprenis nian artikolon pri la Instituto de Woluwe-St-Lambert kun kelkaj ilustraĵoj. La revuo, beletristika, estas tre bele ilustrita. La numero preparolata enhavas, inter aliaj, belajn kopiaĵojn laŭ verkoj de l' francaj artistoj Albert Besnard kaj Rodin.

« Obchodné Listy », alia bohema revuo, enpresas kurson pri Esperanto, kaj raportas bohemale pri ĉiu nova aŭ malnova verko sendita al la redakcio: Lingvo internacia Esperanto: Praha II, 312. Karlovo n'aus.



# Gazetaro.

Ni transsendas al la jenaj revuoj abonojn akompanatajn de la abonkosto. — Aldoni 10 centimojn por la transsendo de la mendo.

## L'ESPÉRANTISTE.

France kaj esperante redaktata, oficiala revuo de la S f p E: 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovrililo kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj. Abono: Francujo 3 fr.; alilande: 3,50 fr. Administracio: Louviers, (Eure), France.

## GERMANA ESPERANTISTO.

Organo de diversaj germanaj grupoj esperantistaj (ĉiumonate). Redaktata germane kaj esperante. JARABONO: 3 f.75 Administracio kaj Redakcio: Esperanto Verlag, Möller & Borel, Berlin, S., 95, Prinzen strasse.

## LA BELGA SONORILO.

Bonega propaganda revuo: Esperante, france, flandre. Unu el la plej malnovaj kaj seriozaj gazetoj Esperantaj. Sciigoj — Literaturo — Scienco. Eliras ĉiumonate. Abono: 4 fr. jare. Kolektoj de antaŭaj jaroj: 6 fr. Ĉe J. Coox, Duffel, (Belgique) kaj ĉe *Tra la Mondo*.

## SUNO HISPANA.

Hispane kaj esperante. Tre grava monata revuo por la propagando de Esperanto en hispanlingvaj landoj, bonege redaktata sub direktado de A. Jimenez Loira. Rakontoj pri hispanaj kutimoj kaj tradukoj laŭ famaj hispanaj aŭtoroj. Abono 3 fr., unu numero 30 cent. Administracio kaj redakcio: Avellanas, 11, presejo — Valencia (Espana).

## ESPERO PACIFISTA.

Monato organo de l'Esperantista Societo por la Paco. Jara abono (aŭ minimuma kotizo al la Societo), 5 frankoj. Krom avizo kontraŭa, la aboninto estas konsiderataj kiel aliĝintoj al la Societo; tiu ĉi akceptas aliĝojn opajn. Sin turni al S<sup>ro</sup> Gaston Moen, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

## THE BRITISH ESPERANTIST.

oficiala monata organo de la Brita Esperantista Asocio; 12 paĝoj da novaĵoj, k. c., anglo-Esperante, kaj 8 paĝoj da Aldono tute en Esperanto. Jare 4 fr. (sen Aldono 2 fr.) — Oni abonas ĉe la Sekretario de la B. E. A., 13, Arundel Street, Strand, London.

## MEKSIKA LUMTURO.

Hispane kaj esperante. — Organo de la Meksika societo por propagandi Esperanton.

Eliras 6 fojojn jare — 3 frankojn — Ĉe D<sup>o</sup> A. Vargas, Santa Rosa Necoxtla (Ver), Meksiko.

## SVISA ESPERO.

France kaj esperante — 2 fr. — Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

## LINGVO INTERNACIA.

Monata esperanta revuo. Fondita en 1895. Literatura kaj propaganda tute en Esperanto.

Abono 7,50 fr. ĉiulande. Unu numero 0 f. 50. Abono estas akceptata de l' komenciĝo de ĉiu monato.

## ANTAŬEN ESPERANTISTOJ.

Hispane kaj esperante. — Organo de la Perua esperantista societo — 3 fr. — Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro, Calle Lártiga, Lima (Peruo).

## ESPERANTISTEN.

Svede kaj esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stokolma Klubo. Tre subteninda por helpi esperantistan movadon en Svedujo. Ĉe P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm.

3 fr. 75 ĉiujare; aparta N<sup>o</sup>: 35 cent.

## ĈILIO ESPERANTISTA.

Senpaga organo propaganda, hispane kaj esperante.

Ĉe So L. E. Sepulveda Cuadra, Casilla 1989 (Santiago-Chile).

## ESPERANTO.

Hungare kaj esperante. Scienca kaj literatura.

4 fr. ĉiulande. Ĉe S<sup>o</sup> Marich Agoston, Papnövelde-Uteza 6, Budapest, IV. (Hungarujo).

## RUSLANDA ESPERANTISTO.

Ĉiumonata organo de la S-to «Espero» en lingvoj Esperanta kaj parte en rusa — Diversspeca, interesa kaj bonstila literatura materialo: artikoloj pri la problemo de lingvo internacia kaj pri Esperanto; vasta kroniko de Esperantista movado (propraj korespondantoj kaj bibliografio; sociala politika fako; novaj famaj beletristikaj (interalie en 1906 j. estos presata la « Ruĝa Rido » de L. Andrejev), versaĵoj kaj mult. al. — La detalaj prospektoj estas riceveblaj, senpage. — La jara abonpago (kune kun membrigo en la S-to « Espero ») — 3 rubloj (7 fr. 50 cent.) — Adreso: Ruslando, St Peterburgo, B. Podjaĉeskaja, 24, al la S<sup>to</sup> « Espero. »

## ESPERANTA LIGILO.

Monata revuo por blinduloj per esperanta Braille'a sistemo. 3 f. — Ĉe So Cart, 12 Rue Soufflot, Paris.

## ESPERO KATOLIKA.

Tute esperante. Unu N<sup>o</sup> afrankita 0 f. 50 Francujo, 4 fr.; alilande 5 fr. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France).

## La plume Sténographique de France.

Universala revuo ilustrata de Stenografio kaj Daktilografio — D<sup>o</sup> L. P. Canet, Adm., 15, Rue Manigne, Limoges. — Ĉiulandaj sciigoj pri ĉio rilatanta la rapidan skribadon kaj la skribmaŝinojn; ĉiusistema stenografio, literatura kaj historia fako, ilustraĵoj, ludoj, k. t. p. Petu specimenon.

## Sinjorinoj!

Se vi volas ne plu suferi je la monataj sangel-fluoj aŭ je la epoko de ilia malapero, ensorbu la

## DRAGÉES BLOTTIÈRE

sendangeran produktaĵon, bombonforman, kiu tuj kaj certe forigos la doloron.

Por havigi la Dragées Blottière, sendu 2.25 fr. poŝt-aŭ kartmandate, 102, Rue Richelieu, PARIS.

## Les Annales politiques et littéraires.

Jare: 10 f. — 15, rue St-Georges, Paris.  
Abono: 10 fojojn repagita per la profitoj de l' « Carnet de la mutualité des Annales » (Libreto de l' reciproka apogo, de Annales).

## JUS APERINTA!

FRANÇOIS COPPEE

## Unua Ĉapitro

de miaj memorskriboj

ESPERANTIGITA DE  
AUGUSTE MOSTROSIER



PREZO: 75 CENTIMOJ

PARIS  
ALPHONSE LEMERRE, ELDONISTO  
27-31, PASSAGE CHOISEUL, 27-31

M. DCCCLX

Ĉarma verketo de l' fama franca akademiano, kun antaŭparolo tute aproba por Esperanto.

Ĉe « Tra la Mondo ».

Sendu mendojn kaj anoncojn kun poŝtaj mandatoj al « Administranto de *Tra la Mondo* », 15 Boulevard des 2 Gares, Meudon (S. et O.), France, antaŭ la 10<sup>a</sup> de ĉiu monato, por la venonta numero.

## ĈIAM TRE LEGBLE SKRIBU.

GÉRANT: EUGÈNE CAPÉ.

A. J. WITTERYCK, Presisto, Bruĝo.

Belegaj propagandaj poŝtkartoj kun vidaĵoj de Alĝerio;

1 fr., afrankite, ĉiu dekduo.

Propagandaj poŝtkartoj de « Tra la Mondo », fr. 1,50 ĉiu cento.

Ĉe « TRA LA MONDO ».